

# juna amiko

septembro 2019 • n-ro 3/2019 (160) ←



**PROGRESIGA REVUO  
POR LEGANTOJ  
INTER 10- KAJ  
100-JARAĜAJ**

*Tra Esperantujo: Esperanto  
en la muzikfestivalo Pol'and'Rock.  
Konversaciaj temoj: Geamikoj kaj geamantoj.  
NATURE: Bildstrio Fito. LUDE: Kia la homo,  
tia lia nomo. En Vroclavo oni kantis Esperantajn  
kantojn. Ombra teatro. Intervjuo kun Luiza Carol.  
Interkultura Mondo: La 52-a ILEI-kongreso en Serbio.*

# Kukuo la feo

Aŭtoro: Ángel Velazco  
Tradukisto: José de Jesús Campos Pacheco

Kukuo partoprenos  
en la internacia kongreso  
pri magio.

Kio estas  
kongreso?


La kongreso estas  
loko kie kunvenas multaj  
uloj.

Kaj kion ili  
faras tie?

Ili prelegas kaj  
samtempe lernas  
novajn fakojn.

Bonege!

Pli bone ol  
partopreni en la kongreso  
estas plenumi ĉion, kion oni  
interkonsentas tie.



# Enhavo



**Enkonduke:** Karaj amikoj! (Stano Marček, SK);

Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) ..... 4



**Konversaciaj temoj:**

Geamikoj klaj geamantoj

(Judit Felszeghy, HU) ..... 5



**Magiaj ciferoj** (Renée Triolle, FR) ..... 9



**LUME:** El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) ..... 10

**Nature:** Bildstrio Fito (Sonmy Alvarez/José de J. Campos Pacheco, CU) ..... 11



**Kantu kun Juna Amiko:**

La pupo Klara (Małgosia Komarnicka, PL/Luiza Carol, IL) ..... 13



**LUDE, la unika dua etaĝo:** Kia la homo, tia lia nomo (Mónika Molnár, CH) ..... 14



**Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj**  
Europejski Festiwal Piosenki Esperanckiej

En Vroclavo oni kantis Esperantajn kantojn (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 17

**Tra Esperantujo:** Esperanto en la muzik-festivalo Pol'and'Rock (Halina Komar, PL) ..... 18



**Ombra teatro** (José de J. Campos Pacheco, CU) ..... 20



**Recenzo:** Alloga romaneto kaj primovada libro por infanoj (Luiza Carol, IL) ..... 21



**Legu librojn – premioj – konkursoj:** Intervjuo

kun Luiza Carol. Ekkonumian landon pere de ĝia legendo: Ĉinio (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 22



**Interkultura Mondo:** La 52-a ILEI-kongreso en Serbio (Elena Nadikova, RU) ..... 31



**Inventoj:** Virinoj inventis (Renée Triolle, FR) ..... 34

Infana kongreseto (Saliko, FI) ..... 35



**Ferii kaj lerni:** BET-55 en Litovio (Liba Gabalda, IT) ..... 36



**LASTE, la tria etaĝo:** Krucenigmo pri Kanado (Stefan MacGill, NL/HU) ..... 38

Landaj Reprzentantoj – Perantoj de *Juna Amiko* ..... 39

**Eldonanto de Juna amiko:** Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo:** sub rekonstruo ĉe [ilei.mondo.info](http://ilei.mondo.info). Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna\\_Amiko](http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko). La numero de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ [lernu.net](http://lernu.net) kaj [edukado.net](http://edukado.net). **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com) aŭ [redakcio@gmail.com](mailto:redakcio@gmail.com). **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio), Utho Maier (Germanio) kaj Rob Moerbeek (Nederlando). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprych, [ilei.officejo@gmail.com](mailto:ilei.officejo@gmail.com). **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en novembro 2019. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en tiel nomataj A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318



# Karaj amikoj!

**D**enove finiĝis, por ni esperantistoj, la plej fekunda jarsezono, somero. En la septembra numero de *Juna Amiko* vi povos legi pri Esperantaj ferioj kaj kursoj dum Baltaj Esperanto-Tagoj en Litovio, pri Esperanta vilaĝo dum grandega rokmuzika festivalo Pol'and'Rock en Pollando, pri la 52-a ILEI-kongreso en Serbio kaj Infana Kongreseto dum la UK en Finnlando. En la rubriko *Konversaciaj temoj* vi konatiĝos kun geamikoj kaj geamantoj en lernejoj, via mondo fariĝos pli kolora danke al la rubrikoj *LUME* kaj *NATURE*. Kanti kun *Juna Amiko* vi povos danke al Luiza Carol. Timi, ŝerci kaj amuziĝi vi povos kun feinoj, sorĉistinoj kaj bestoj – kaj admiri belajn bildojn de svisaj lernantoj en la rubriko *LUDE*.



Vi ekscios, ke en la pola urbo Vroclavo oni denove kantis Esperantajn kantojn kaj ke teatron oni povas ludi ankaŭ per ombroj kaj viaj manoj. Pri interesa romaneto por infanoj kaj impresaj libroj de Luiza Carol vi ekscios en la rubrikoj *Recenzo* kaj *Legu kaj ĝuu ...* En la rubriko *Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo* vi ekscios interesajn faktojn pri la tre granda lando en orienta Azio, Ĉinio, kaj pri tre malnovaj

ĉinaj legendoj pri amo kaj spirito kun obstina persisteco. En la rubriko *Inventoj* vi povas legi, kion plian inventis saĝaj virinoj en la mondo. Interkultura Mondo prezentos al vi la 52-an ILEI-kongreson en Serbio kaj en la rubriko *LASTE* vi denove povos solvi krucenigmon kaj konatiĝi kun Kanado, kie okazos la venontjara 105-a Universala Kongreso de Esperanto.

Agrablan legadon, karaj junaj amikoj!  
Via redaktoro **Stano Marček**

# Karaj legantoj!

**K**vankam la revuo kuŝas tute silenta en viaj manoj, legante ĝin vi malkovros muzikon, kantojn kaj dancojn abunde kaj bunte. Aldoniĝas teatro kun Saŝa Pilipoviĉ kaj ombroteatro el Indonezio kaj Ĉinio. La stiloj malsamas; en Pollando temis pri rokmuziko, en Serbio infana grupo prezentis popoldancojn.

Kiom da fotoj en tiu kajero prezentas homgrupon en korusa kantado aŭ vica staro dum aŭ post dancado? Nombro! Mi vidas ses! Se ni konsideras legendojn en literaturo, vi komprenas,



ke tiu kajero faras grandan lokon al artoj. Artaĵoj celas esti belaj kaj voki emociojn; nur homoj produktas artaĵojn; artaĵoj ne nepras por vivi, ili estas plia donaco al la vivo, ili beligas niajn tagojn. Vi rajtas kanti legante la revuon *Juna Amiko*!

En tiu kajero ni ricevos eĥojn de du gravaj eventoj: la Kongreso de ILEI kaj la Baltaj Esperanto-Tagoj; kaj ni vojaĝos al Ĉinio, bunta kaj vasta lando kun multaj malsamaj etnogrupoj. Legante pri inaj inventistoj, niaj legantinoj emos specialiĝi en sciencoj kaj sekvi tiun vojon, eble, espereble...

Mi deziras al vi bonan legadon !

**Mireille Grosjean**



# Geamikoj kaj geamantoj

Help-materialo por progresemluloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy

## I. Kiel trovi la iamajn geamikojn

**Leona (L) kaj Karina (K) babilas ĉe Karina.**

L - Tiu fruktoteo estas eksterordinare bongusta!

K - Ĝi estas tute speciala, Leona, mi miksis ĝin! Mi deziras tamen starigi demandon al vi: Ĉu vi scias, kio okazis antaŭ kvin jaroj, en tiu tago?

L - Antaŭ kvin jaroj... Mi divenu tion... Eble vi edziniĝis, ĉu?

K - Ne, ne! Nun ne temas pri mi! Sed mi ne lasu vin inter duboj! Antaŭ kvin jaroj ni vizitis lastfoje

nian mezlernejon.

L - Ho, jes ja, vere! Ĝuste antaŭ kvin jaroj, la 15-an de junio ni eliris el la klasĉambro lastfoje!

K - Kaj la sekvan tagon ni partoprenis la jarfinan solenaĵon.

L - Ĝuste, kaj poste komenciĝis la abiturientaj ekzamenoj.

K - Tial mi pensis, ke estus oportune okazigi renkontiĝon, ĉi-jare, kun niaj tiamaj samklasanoj.

L - Bonega ideo! Kie kaj kiam? Ĉu ni kunvenu en nia iama lernejo? Aŭ prefere en iu restoracio? Aŭ ĉe ies hejmo?

K - Mi pensas, ke la renkontiĝo povus okazi aŭtune, ĉar nun multaj





## Konversaciaj temoj

libertempas. Pri kelkaj mi scias absolute nenion!

- L – Post la gimnazio mi flegis kontakton kun multaj el ni. Mi notis, kiam estas datrevenoj, aŭ nomtagoj, kaj tiam mi telefone aŭ sur poŝtkarto gratulis al ili. Al kelkaj mi skribis en Fejsbuko, sed mi ne retrovis tie jam multajn iamajn samklasanojn.
- K – Ankaŭ mi jam trarigardis Fejsbukon, kaj mi same ne renkontis la knabinojn, kiuj ankoraŭ mankas en mia listo. Kiel trovi ilin? Eble kelkaj edziniĝis, kaj ilia familia nomo verŝajne ŝanĝiĝis. Vi amikiĝis kun la plej multaj samklasanoj, kaj tial mi pensas, ke vi konas la plej multajn el ni. Rigardu, mi trovis la bildon, kiu estis fotita lastfoje pri nia klaso!
- L – Karina, mi nun rememoras, ke Maria, kiu sidis malantaŭ mi, sendis al mi anoncon pri sia edziniĝo, jam antaŭ kvar jaroj!
- K – Tiu Maria, kun longa blonda hararo kaj bluaj okuloj, ĉu? Tiu ĉi, la tria de maldekstre en la dua vico.
- L – Ne, sed la alia Maria, kiu havis mallongajn, kaŝtanajn harojn kaj okulvitrojn. Tiam mi ne povis partopreni la geedziĝan solenaĵon, sed mi per retmesaĝo gratulis ŝin kaj ŝian fianĉon. Mi notis en mian telefonon la telefonnumeron de Maria, mi povas voki ŝin.
- L – Halo, ĉi tie parolas Leona, se vi rememoras pri mi, el la gimnazio... Jes, dankon, tre bone, kaj vi? ... Ho, ĉu vere? Mi ĝojas, kaj gratuals vin ambaŭ! Aŭskultu, Maria, kun Karina ni decidis okazigi renkontiĝon okaze de la kvinjara datreveno de nia abiturientiĝo. Jes, kompreneble! Bonege, se ankaŭ vi povas veni! ... Certe, mi informos vin ĝustatempe pri dato, tempo kaj loko! ... Mi transdonos vian saluton al ŝi! Ankaŭ mi kore

salutas vian edzon. ... Jes, tre volonte! Mi same deziras iom babiladi kun vi! .... Pri kiu? Ne, mi ne konas ŝian telefonnumeron. Jes, menciu ankaŭ al Karla, ke ni planas renkontiĝon. ... Do, ĝis baldaŭ, Maria, brakumojn!

- L – Imagu, Maria havas jam infanojn! Ili estas jam 15-monataj kaj ĝemeloj. Knabo kaj knabino!
- K – Sed kio pri la blondhara Maria?
- L – Pri la blondhara Maria mi scias nenion, ĉar fine de la lernoĵaro ni rompis la rilatadon, kaj ni neniam plu interparolis!
- K – Ho, ĉu vere? Sed kial?
- L – Stulta historio, kaj ankaŭ longa.





## II. Kiel malkaŝi malnovajn sekretojn

### Leona (L) kaj Karina (K) babilas ĉe Karina.

K – Rakontu nun, ni havas tempon! Mi alportos ankoraŭ fruktoteon, kaj preparos ankaŭ kelkajn sandviĉojn.

...

K – Jen la teo, mi verŝas ĝin en vian tason, kaj gustumu la sandviĉojn!

L – Bonguste aspektas la sandviĉoj! Mi volonte prenos unu.

K – Prenu pliajn, mi certe ne portos ilin reen al la kuirejo! Sed rakontu tamen,

kio okazis inter vi kaj Maria! Mi estas ege scivolema!

L – Vi estas scivolema kaj sekretema Karina! Vi neniam rakontis al mi pri via koramiko, mi eĉ tion ne scias, ĉu finfine vi edziniĝis aŭ ne.

K – Mi certe ne edziniĝis! Sed rakontu jam la aferon pri Maria!

L – Do, bone, sed promesu, ke poste ankaŭ vi malkaŝos vian sekreton! Vi eble rememoras pri Ladislao Stalforta. Ĉu?

K – Jes, ja! Alta kaj sufiĉe belaspekta knabo li estis, kun malhelbrunaj bukklaj haroj kaj nigraj okuloj.

L – La knabinoj ŝatis lin, kaj sopiris, ke li amindumu al ili.

K – Ho, mi eĉ ne rimarkis tion!

L – Jes, ĉar tiutempe vin interesis nur nia eksa instruisto pri fiziko, ha ha! Maria tamen estis tute enamiĝinta al Laĉjo, kaj tre ĵaluza je ĉiuj, kiuj estis ĉirkaŭ li. Speciale je mi. Sed neniu sciis, ke ni kaŝe helpis unu la alian, li tradukis miajn esperantlingvajn tekstojn, kaj mi klarigis al li la kemion, kaj lasis, ke li kopiu por si mian hejmtaskon. Tion ni faris kutime antaŭ la studhoroj; ni ambaŭ sidis en la lernoĉambro jam unu horon antaŭ la komenco. Dume ni ankaŭ interamikiĝis, kaj li rakontis al mi foje, ke lin tute ne interesas la samklasanaj knabinoj.

K – Sed, kiu? Kiu lin interesis?

L – Ne scivolemu! Vi eble ekscios tion, eble...

K – Do, bone. Tio restu sekreto de Ladislao kaj vi. Kaj kio pri Maria?

L – Ĉu vi rememoras pri la abiturienta bankedo?

K – Certe! Ĝi estis bela festo! Ni prezentis malferman dancon, en elegantaj roboj, bonega muziko estis, bufedo kun bongustaj mangaĵoj.

L – Ĉu vi rememoras, kiu dancis kun kiu?

K – Ŝajnas al mi, ke ni ĉiuj dancis kun ĉiuj.





## Konversaciaj temoj

Ankaŭ niaj geprofesoroj dancis kun ni. Mi dancis kun ĉiuj knaboj el nia klaso, ankaŭ kun Ladislao.

- L – Ĉar la eksa instruisto pri fiziko ne ĉeestis la bankedon.
- K – Li tamen videblas en la foto! Jen, en la plej malantaŭa vico li estas. Krome, li partoprenis en preskaŭ ĉiuj ekskursoj de nia klaso; mi havas kelkajn fotojn pri tiuj eventoj.
- L – Montru ilin al mi! Mi rememoras, en tiu bildo ni estis en la montaro! Tiu ĉi estis nia unua dutaga ekskurso; ni veturis aŭtobuse. Sed kiu estis sidanta apud mi? Mi ne rememoras pri tiu diketa knabo kun rufaj (*ruĝe-flavaj*) haroj kaj okulvitroj!
- K – Ĉu ne? Li estis Joĉjo; vi ja ege plaĉis al li; en la posta jaro li tamen ŝanĝis lernejon, kaj ne plu estis kun ni. Rigardu, en tiu ĉi bildo ni estis preparintaj bivakon kaj tiam ni ion rostis subĉiele.
- L – Ne, ni ne rostis, sed ni kuiris gulaŝon! Mi rememoras pri tio, ĉar tiam mi kuiris gulaŝon la unuan fojon. Jen mi, mi estis gustumanta ĝin.
- K – Vere, tio estas ja vi! Rigardu, Leona, mi dume skribis jam liston, en kiu ni povas atingi telefone aŭ rete.
- L – Paŭlo...? Ĉu tiu alta knabo el la lerneja futbalteamo?
- K – Jes, sed mi forgesis lian familian nomon, kaj mi scias nenion pri li.
- L – Mi iam aŭdis, ke li jam ludas en la urba futbalteamo, sed... eble Ladislao eĉ konas lian telefonnumeron.
- K – Ladislao, ĉu?

### III. Kiam ĉio solviĝas

**Post 3 monatoj, Karina (K), Leona (L), Ladislao (La), Maria (M), Joĉjo (J), la iamaj samklasanoj kaj ilia estinta**

**instruisto Andreo (A) babilas antaŭ iu restoracio.**

- La – Saluton sinjoro instruisto!
- A – Saluton Leona, saluton Ladislao! Mi petas, ke vi alparolu al mi nur simple Andreo! Mi ja ne estas multe pli aĝa, ol vi!
- L kaj La – Dankon, do – Andreo! Ni ĝojas, ke ankaŭ vi venis al nia datrevena festo!
- A – Karina insistis, ke mi nepre venu. Sed jen ŝi, ĵus alvenanta! Saluton karulino!
- K – Saluton Andreo! Saluton Leona kaj Ladislao! Ĉu vi... kune?
- L – (en si mem) Karulino...? Jes, fakte jam ekde la gimnaziaj jaroj.
- K – Sed kial tio devis esti sekreto?
- La – Vi rememoru, Karina, ke la knabinoj el la klaso ŝatis esti proksime al mi... krom vi, kompreneble! Kaj Leona ne volis esti unu el ili, kaj same ne volis, ke Maria prezentu scenon pri ĵaluzeco. Maria poste eĉ skribis al mi leteron, ke ŝi sin mortigos, se mi ne edzinigos ŝin! Mi respondis, ke tio estas ne ebla, ĉar mi tuj post la abiturientiĝo veturos eksterlanden, kie mi laboros, kaj ankaŭ studos. Tio estis vero, kaj mi revenis definitive nur ĉi-somere.
- L – Ankaŭ al mi ĉiam tre plaĉis Ladislao, ne nur pro sia aspekto, sed ĉefe pro sia firma karaktero, ke li estis ĉiam fidela kaj sincera al mi, sed mi ne volis elmontri tion.
- La – Post tri monatoj ni geedziĝos! Leona finfine konsentis esti mia edzino!
- K – Kia surprizo! Do, tio estis via sekreto! Mi gratulas al vi ambaŭ! Sed ĉu ni ne eniru en la restoracion, ekstere estas jam malvarmete!

(ene de la restoracio)

- L – Estas ankoraŭ neniu ĉi tie, krom ni!
- A – Ni frue alvenis! Ni eluzu la tempon, kaj trinku ĉampanon kvarope. Mi invitas vin ĉiujn. ... Je via sano Karina dolĉa, je via sano Leona kaj Ladislao!





K – Je kio ni trinku?

A – Je tio, ke ankaŭ Karina kaj mi fariĝos geedza paro baldaŭ!

La kaj L – Gratulojn! Je vi!

L – Mi jam suspektis tion!

La – Sed kial tio estis tiom longe sekreto?

A – Kiam mi instruis fizikon al via klaso, mi havis edzinon. Tamen Karina ege ekplaĉis al mi. Ne tial, ĉar ŝi estis lernema kaj laborema – kvankam ne speciale pri fiziko – sed ŝi estis ĉiam vigla, helpema, kaj ŝi ĉiam havis bonajn ideojn.

K – Vi forgesis diri, ke ankaŭ talenta kaj bela, ĉu ne, Andreo?

A – Do, mi opiniis, ke pli bone estus foriri el via gimnazio, kaj instrui en alia mezlernejo. Sed la amo ne ĉesis, kaj mi fine divorcis.

K – Tiel nun ni estas kune, jam ni ne devas kaŝi nian rilaton!

L – Kiel romantike!

K – Jen, alvenadas jam ankaŭ la aliaj!

L – Rigardu! Joĉjo staras ĉe la pordo, mi apenaŭ rekonas lin; li multe maldikiĝis; li estas ... kun... Maria! (al la alvenantaj) Saluton! Bonan vesperon!

M kaj J – Saluton al vi ĉiuj! Ho, sinjoro instruisto!

A – Bonvolu sidiĝi! Kaj nomu min simple nur Andreo. Mi estas la partnero de Karina.

La – Bonege, ke vi ambaŭ alvenis... kaj kune!

M – Ni estas jam ne sufiĉe junaj por ofendiĝi... kaj fakte ĉio estas bona tiel, kiel okazis! Mi ĝojas vidi vin kune, Leona kaj Ladislao!

J – Ni faru belan bildon pri ni, kune! Halo, kelnero! Bonvolu plian botelon de ĉampano, kaj fotu nin kune, mi petas!

## TASKOJ

I. Legu la dialogojn atente, notu la nekonatajn vortojn, kaj demandu pri la signifo vian kursestron, aŭ kontrolu ilin en vortaro!

– Legu la dialogojn laŭte, kun viaj partneroj!

– Preparolu kun viaj partneroj, pri kio temas en la dialogoj!

– Rakontu nacilingve aŭ/kaj en Esperanto la enhavojn de la dialogoj!

II. Prezentu viajn geamikojn! Kiel ili aspektas, kia estas ilia karaktero!

– Rakontu, kiu estas via plej proksima amiko aŭ amikino, de kie vi konas lin aŭ ŝin, kaj kial vi sentas vin proksima al tiu.

– Rakontu, kiel vi tenas la kontaktadon kun viaj geamikoj!

III. Skribu leteron (aŭ mesaĝon) al via amiko (amikino) okaze de iu datreveno!

– Skribu invitilon al viaj iamaj samklasanoj por kunveno aŭ festo, okaze de la datreveno de abituriento (diplomiĝo, ktp)!

– Skribu leteron al via amiko (amikino), en kiu vi rakontu, ke inter vi kaj via alia amiko (amikino) okazis problemoj, ofendiĝo, aŭ miskompreno, kaj kiel vi poste repaciĝis!

## Magiaj ciferoj

**Kalkulu la aĝon, se vi konas la grandecon de la piedoj!**

Aldonu du nulojn al la piedmezuro, ekzemple 2600.

Subtrahu la jaron de la naskiĝo.

Al la rezulto aldonu la nunan jaron.

Rigardu la rezulton: la du lastaj ciferoj indikas la aĝon!



**Renée Triolle**



# El mia kolora vivo



Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak

Kolorigu la suban bildon laŭ la supran! Nomu la objektojn, bestojn kaj homojn! Kion ili faras? Kiujn vestojn portas la homoj? Kiujn kolorojn havas la objektoj, bestoj kaj vestoj? Kio okazas sur la bildo?





Aŭtorino: Sonmy Alvarez. Tradukisto: José de J Campos Pacheco.



Por: SONMY

Venu, tio estas terura.



Vidu, la avino Paula transloĝiĝos kaj aliaj personoj loĝos tie.



Kio okazos al ŝia ĝardeno?

Kaj kun la bestoj, kiuj loĝas tie?



Aŭdu, ne troigu, ni vidu kio okazas





Supreniru ĝis la fenestro.

La floroj de la avino estas preferataj de la abeloj.

Permesu aŭdi

Ni devas ekkoni la personojn, kiuj loĝas ĉi tie.

Atentul!

Amalia, kie vi estas?

En mia dormo-ĉambro...

Panjo, venu ĉi tien. Jen belega ĝardeno.

Bone ploremuloj, la avino transloĝiĝis...

Sed ŝi lasis bonajn anstataŭantojn.



# La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, [malgosia.junaamiko@gmail.com](mailto:malgosia.junaamiko@gmail.com)



**Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, ebligas revii, aŭ transdoni niajn sentojn.**

**Ĝ**i ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, kantante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiunaniere la lernantoj plej bone kaj sugestie alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo. La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

La kanton *La pupo Klara* por la legantoj de *Juna Amiko* verkis Luiza Carol (legu pri ŝi sur la paĝoj 22-25).

## La pupo Klara

*Klara, Klara,  
pupo kara,  
la ludado nun finiĝas,  
malfruiĝas, malfruiĝas.  
Vi surmetu la piĝamon  
dum mi faros la samon.  
Vi dormos kun la suĉilo  
en la malnova lulilo,  
dum mi sola enlitiĝos,  
ĉar mi morgaŭ fariĝos  
kvin-jaraĝa, kvin-jaraĝa,  
do mi devas esti saĝa,  
serioza kaj kuraĝa.*

*Mallumon mi ne plu timos,  
ekplori mi ne plu kutimos.  
Kiam tiu ĉi kanto finiĝos  
mi vin kisos  
kaj enlitiĝos.  
Klara, Klara,  
pupo kara,  
pupo kara.*

### LA PUPO KLARA

Vortoj kaj melodio: Luiza CAROL

Am Dm  
Kla - ra Kla - ra pu - po ka - ra la lu - da-donun fi - ni - ĝas mal - fru - ti - ĝas, mal - fru -

6 Em Dm C  
i - ĝas visur - me-tu la pi - ja - mon dum mi fa - ros la sa - mon vi dor - mos kun la su -

11 G7 C G7  
ĉi - lo enlalamal - no - va lu - li - lo dum mi so - la en - ti - ti - ĝos ĉar mi morgaŭ fa -

17 Am Dm  
ri - ĝos kvin ja - ra - ĝa kvin ja - ra - ĝa domi devas es - ti sa - ĝa se - ri - o - za kaj ku -


23 Em Dm C  
ra - ĝa mal - lu mon mi ne plu ti - mos ek - plo - ri mi ne plu ku - ti - mos ki - am

27 G7 C Am  
ti - u ĉi kan - to fi - ni - ĝos mi vin ki - sos kaj en - ti - ti - ĝos Kla - ra Kla - ra pu - po

33  
ka - ra



# Kia la homo, tia lia nomo



La rubrikon prizorgas **Mónika Molnár**



**Pensemulido estis  
profunde en siaj pensoj,  
kiam Ŝercemulido iris**

**mallaŭte apuden kaj diris: “Buuuu!”.**

**K**ompreneble povas Pensemulido eksaltis pro la timo kaj tuj poste jam pli koleris ol timis. Li forte grumblis: – Kion vi pensas? Ĉu oni vere povas fari tion al la aliaj?

– Sed ... – diris hezite Ŝercemulido – sed estis amuze. Ĉu ne?

– Amuze? Por kiu? Por mi certe ne. Sed kion mi povus atendi de iu, kiel vi?

– Iu, kiel mi? – miris Ŝercemulido – Kial? Kia mi estas laŭ vi? Ĉu ŝercema? Ĉu amuza? Ĉu eĉ amuzege ŝercema? Ĉu ...?

– Sufiĉas! Vi estas ... vi estas ... eh, lasu! Kun

via nomo vi eĉ ne povus esti alia. Ĉu vi scias, ke laŭ latina proverbo nia nomo antaŭdiras nian destinton?

– Ne, mi ne sciis tion, sed mi ne nepre konsentas. Ĉar se tio estus vera, tiam vi certe ne nomiĝus Pensemulido, sed Grumblemulido! Vi vere ne estis ĝentila al mi!

– Pardonu min, frateto! – diris kun honta vizaĝo Pensemulido. – Mi simple ne dormis sufiĉe, kaj estas iom laca. Pluse, kiam vi alvenis, mi ĵus pripensis tiun aferon pri la nomoj, kaj via ŝerco ĝenis min en la pensado. Sed certe mi ne volis esti malagraba kun vi! Kaj eble vi pravas pri la nomoj! Antaŭe mi certis, ke la feinoj ĉiam estas bonaj personoj, kaj la sorĉistinoj ĉiam malbonaj. Sed mi ĵus havis en miaj manoj la rakonteton de Cloé, kaj mi ne plu certas. Aŭskultu ĝin!

		
<p><b>Cloé De Bernardini:</b> <b>La feino</b></p>	<p>La feinoj vivis en la arboj kaj ili havis unu birdon. Iun tagon la birdo forflugis. La feinoj serĉis la birdon ĉie. Ĉu la birdo sekvis sian revon vojaĝi per taksio?</p>	<p>La feinoj longe serĉis la birdon, sed vane. Ili eĉ trovis la taksion, kiu povintus esti ... Sed! Malantaŭ la taksio estis sorĉistino, kiu demandis:</p>



<p>“Kion vi faras, feinoj?”  “Ni serĉas nian birdon.”  “Vian birdon? Mi pensas, ke mi manĝis ĝin!” – diris la sorĉistino. La granda feino ekploregis.</p>	<p>“Ne! Ne ploru!” – diris la sorĉistino. “Mi nur ŝercis! Pardonon! Kompreneble via birdo estas en la taksio. Ĝi sekvis sian revon. Ĉu ni povus esti amikoj?”</p>	<p>La feinoj jesis kaj ĉiuj iris per la taksio al la domo de la feinoj, kie ili preparis grandan feston. Post la festo la feinoj iris en siajn litojn por dormi.</p>
		<p>– Ho! Kiom bela rakonto! – entuziasmis Ŝercemulido. – Sed mi pensas, ke la ŝerco de la sorĉistino estis multe pli malbona ol la mia al vi ... Ŝi diris, ke ŝi manĝis la amikon de la feinoj! Kia ideo! Mi promesas, ke mi neniam faros ion similan al vi! Sed sen iu ajn ŝerco, permesu al mi, ke ankaŭ mi rakontu al vi historieton de Numa pri neordinara sorĉistino.</p>
<p>Sed ĉu vere ĉiuj iris dormi? Ŝajne ne. La granda feino kaj la sorĉistino ne dormas. Ili ludas ĉirkaŭ la feina arbo.</p>	<p>Tiu nokto estis plena je falantaj steloj. Ili sidis por rigardi ilin kaj eble por deziri silente ion belan.</p>	



La bildojn kaj la rakontojn preparas infanoj de la lernejo La Granda Ursino (La Grande Ourse) en la svisa urbo La Chaux-de-Fonds. Ili ĉiuj lernas Esperanton! La lernejo uzas Freinet-an pedagogion. Artikolo pri la lernejo aperis en *Juna Amiko* 2/2015 (elŝutebla ĉe [www.eventoj.hu/juna-amiko/](http://www.eventoj.hu/juna-amiko/)). Pliaj informoj troveblas ĉe [http://grande-ourse.ch/e\\_index.htm](http://grande-ourse.ch/e_index.htm).





<p><b>Numa Schmucki:</b> <b>La ĝentila sorĉistino</b></p>	<p>La ĝentila sorĉistino nomiĝis Sortila. Ŝi havis unu strileonon, kiu estas estaĵo duone strigo, duone leono.</p>	<p>Unu tagon Sortila faris magian miksaĵon kaj Strago, la strileono plongiĝis en la miksaĵon. "Neee!" – kriis Sortila.</p>	<p>Sed estis tro malfrue. La strileono jam transformiĝis al delfeno. Sortila faris unu alian miksaĵon.</p>
<p>Ŝi plore metis la delfenon en la novan miksaĵon, kaj... Kaj la delfeno transformiĝis al ... birdo ...</p>	<p>Kion fari? Sortila denove faris novan miksaĵon, kaj ŝi metis la birdon en la miksaĵon. Kaj ...</p>	<p>Kaj jen la birdo transformiĝis al ... strileono! "Jes!" – diris Sortila, vidante la ĉarman kapeton de Strago.</p>	<p>Post tiu misaventuro Sortila diris nur tion: "Mi neniam plu volos fari magiajn miksaĵon!"</p>

– Dankon, Ŝercemulido! Mi tre ŝatis tiun ĉi historieton. Kaj la birdeto kun leona kapeto estas vere ĉarma estaĵo! – diris Pensemulido.

– Jes, kaj jen nova pruvo, ke la nomoj estas simple nomoj. Ne ili determinas niajn destinojn, karakteron, eĉ se ... Mi vere ŝatas ŝerci, kaj mi nomiĝas Ŝercemulido. Hahaha!

– Jes! Mi pensis ekzakte la samon!  
– aldonis amuz-miene Pensemulido.

– Kaj se mi aŭskultas iom mian ventron, ĝi diras al mi, ke mi eble devus serĉi Kuiremulidon!

– Ho, ne ŝercu, prefere serĉu lin! Hahaha! Kaj mia ventro diras, ke mi nepre devas helpi vin en tiu misio. Mi eĉ ne komprenas kial! – replikis gaje Ŝercemulido.

– Ni alportu al li niajn rakontetojn. Mi certas, ke li ŝatos ilin same, kiel mi ŝatas la kuiritaĵojn de Kuiremulido. Venu! Ek!





# En Vroclavo oni kantis Esperantajn kantojn



**Eŭropa Festivalo  
de Esperantaj Kantoj**  
Europejski Festival Piosenki Esperanciskiej

**La 7-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj okazis la 25-an kaj la 26-an de majo 2019 en Vroclavo, la ĉefurbo de la pola regiono Malsupra Silezio.**

**G**i okazis sub patronado de UEA, Prezidanto de Vroclavo Jacek Sutryk, ILEI, Eurokka, *Juna Amiko*, Interreta Radio KSON, Mila Van Der Horst Kolińska kaj Bohdan Aniszczuk – prezidanto de la Komisiono pri Edukado kaj Junularo.

La organizanto, Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, sukcesis ricevi monsubtenon de Urba Oficejo de Vroclavo, en Kultura Fako. La aranĝo mem okazis en la impona kaj prestiĝa loko, en Filharmonio de Witold Lutosławski.

La 25-an de majo okazis provludoj de la partoprenantoj, kiujn gvidis Halina Kuropatnicka-Salamon kun helpo de Lucyna Kowalewska. Kvar ĵurianoj havis pezan taskon elekti gajnintojn en du kategorioj (koruso aŭ ensemblo, solisto) kaj en konvena aĝkategorio (infan-junulara, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj). Ĉiu partoprenanto prezentis unu nacilingvan kanton kaj unu en Esperanto, sed dum la Koncerto de la Premiitoj, ĉiu gajninto prezentis nur Esperantan kanton. Ĉi-jare partoprenis en la festivalo multe pli da pliaĝulaj korusoj kaj solistoj, sed malpli da infanoj kaj junuloj ol en antaŭaj jaroj. La ĵurion kreis specialistoj – esperantistoj (Małgosia Komarnicka el Pollando, Jean-

Marc Leclercq el Francio, UEA-estrarano Stefan MacGill el Nov-Zelando) kaj muzikistoj (Jean-Marc Leclercq el Francio kaj Jakub Tracz el Pollando).

La 26-an de majo okazis la Koncerto de la Premiitoj, krona punkto de la festivalo. La publiko estis salutita de reprezentanto de la vroclava registaro. Tiun koncerton gvidis Małgosia Komarnicka, la iniciatinto de la festivalo kaj JoMo, Esperanto-kantisto. Post mallonga prezento de la festivala regularo la publiko kun plezuro aŭskultis la premiitajn kantojn kaj fine JoMo sprite interagis kun la pola publiko kaj tiel dancige kantis, ke la publiko, ĝuante la belajn kantojn en Esperanto, dancis sur la scenejo kaj apud ĝi. Dum tiuj du festivalaj tagoj estis plurfoje menciita la subteno de UEA, dank' al kiu estis impone presita kaj bindita Festivala Kajero n-ro 1, kiu entenas historion de la festivalo kaj foton kun biografia noto de la partoprenantoj de la 6-a festivalo. Ĉi-jare estis konkondukita ARKONES-Premio kaj la festivalo abundis je multaj belaj premioj. Ĉiu premiito ricevis belajn atestilon, pokalon, Festivalan Kajeron kaj diversajn donacojn.

La 7-an Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj akompanis unike bela kaj rava etoso. La publiko entuziasme reagis, ĝoje aplaudis, vigle mangestis, koruskriis kaj dancadis sur la podio. La organizanto, Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, jam invitas vin partopreni en la venonta, 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.

**Małgosia Komarnicka**





Halina Komar

# Esperanto en la muzikfestivalo *Pol'and'Rock*



**La kvara “Multkultura Vilaĝo Esperanto” okazis komence de aŭgusto dum la jubilea 25-a grandega festivalo. Neimagebla amaso de publiko – ĉirkaŭ 800 mil ĉeestantoj – kaj dum la grandaj koncertoj – ĝis miliono!**

**K**iel kutime pri la fizikaj/teknikaj kondiĉoj de Multkultura Vilaĝo Esperanto zorgis la amikoj el Vroclavo: Michał Sidorowicz kaj Patryk Zadka. Rolo de CEM – Centro de Interkultura Edukado Nowy Sącz – Wrocław – estis batali por kolekti necesan monon kaj organizi la ĝustan laborteamon, prepari necesan stokon de informiloj, flugfolioj kaj broŝuroj.

Multkultura Vilaĝo Esperanto estis denove situanta rekte antaŭ la ĉefa enirejo al la sidejo de Festivalaj Organizantoj – ASP (Akademio de Belegaj Artoj). Por rezervi tian prestiĝan lokon, la kolegoj el Vroclavo venis tien jam du tagojn pli frue.

Pol'and'rock-festivalo probable estas la sola tiom granda festivalo. Ĝi estas tute senpaga, ĉar estas organizata de la karitata fondaĵo, kiel danko pro la volontula laboro de cent miloj da junaj homoj en Pollando, Eŭropo kaj sur aliaj kontinentoj. Celo de la agado estas kolekti monon por hospitala aparataro (vintra Kampanjo WOŚP).

Tial la festivalo estas ne nur amuziĝo, sed ankaŭ kunesto de tre valora junularo, entuziasme kaj volontule laboranta dum vintro por noblaj, homhelpaj celoj... En Kostrzyn ĉe Odrow, ĉe la pola-germana





landlimo, nur 100 km de Berlino, amuziĝis amike kaj gaje centmiloj da junaj homoj laŭ la festivala alvoko: “Amikeco-Amo-Muziko”. Regis tie grandioza etoso – neimagebla ĝojo pro kunesto de tiom granda junulara homamaso.

En la programo de Multkultura Vilaĝo Esperanto furoris Esperanto-lecionoj de Stano Marček (3 unuhoraj kursoj por komencantoj antaŭtagmeze kaj 3 unuhoraj kursoj posttagmeze) kaj prelegoj de Kamil Dudkowski pri malmultekosta vojaĝado/vagado tra la mondo. Tre alloga estis la programero “Five o’clock” kun interesaj diskutoj, allogantaj plenan tendon da gastoj kun filozofiaj intereso. Estis ĝojige kaj interese, ke ni atingis propran publikon de inteligentaj, diskutemaj homoj. Nia “Vilaĝo Esperanto” jam estas

konata kaj traktata kiel agrabla, gastama loko. Revenadas al ni gastoj el la pasintaj jaroj.

Pri la estonta laborteamo: la grupon ni kreis el esperantistoj en Nowy Sącz, Varsovio kaj Vroclavo. La “ŝlosilojn” mi nun disponigas, pro miaj aĝo kaj sanproblemoj, al Ata (Małgorzata Kaczanowska), kiu fariĝos anstataŭ mi “vilaĝa dommastrino”. Aliaj homoj por gvidi la programon: Esperanto-kursoj: Stano Marček, divers-temaj prelegoj: Kamil Dudkowski, servado kaj informado ĉe standoj: Lidia Komar, Patrycja Barwińska, Eliza Gładys, Zuza Kornicka, Ata. El Varsovio ni havas tre entuziasmajn kaj laboremajn Kamil Getka kaj Maria Sułkowska. Ili deĵoras, fotas, informas, aĉetadas, ordigas... – Koran dankon kaj pluajn sukcesojn al ĉiuj!





José de Jesús Campos Pacheco:

# Ombro-teatro

“Ĉinajn ombrojn” oni konis jam de pratempe en Indonezio kaj Ĉinio. Poste ili estis konataj en Grekio kaj Afriko. Jam en la 18-a kaj 19-a jarcentoj, do antaŭ 200 jaroj, ili estis tre disvastigitaj en Eŭropo.

**O**ni diras, ke la ombro-teatro estis kiel la praavino de la kinejo, ĉar oni uzas la lumon kaj la movojn en ĝi kiel en la kinejo.

Kun la ĉinaj ombroj oni povas krei bildojn, fantaziajn fabelojn, sciencajn fikciojn, poezion ktp, ili malaperas en la aero, ili grandiĝas kaj malgrandiĝas.

## Kiel fari ĉinajn ombrojn?

1. Elektu fabelon, poemon aŭ kanton kaj iliajn rolludantojn, tiujn desegnu sur kartoneton, poste eltranĉu ilin kaj dorse



La kuniklo: pentraĵo de Ferdinand du Puigauveau

metu ligneton (bastoneton), por manipuli ilin, de la supra aŭ de la malsupra parto.

2. Kiam vi finfaris la rolludantojn, pendigu littukon sur horizontalan ŝnureton tiel, ke ĝi estu kurteno, kiu servos kiel ekrano. Lumigu lampon malantaŭe.

3. Metu malantaŭ la lumon (inter la lumon kaj la ekranon) la rolludantojn de la fabelo aŭ kanzono. Provu, ke la lumo ludu kun la movoj kaj grandeco de viaj rolludantoj. Vi povas havi belegan rezulton. Provu kaj vidu!



Ombrojn vi povas fari ankaŭ per viaj manoj. Bruligu kandelon aŭ uzu lampon. Staru inter la lumfonto kaj la muro aŭ blanka tuko kaj “projekciu” per viaj fingroj kaj manoj bildojn.



Luiza Carol

# Alloga romaneto por infanoj



romaneto, pri aventuroj okazantaj dum la Kongreseto por Infanoj, kadre de la Universala Kongreso en Brazilo. Temas pri multaj misteroj, malaperoj kaj aperoj de aĵoj, sekreta malnova mesaĝo, forrabo de du infanoj, antikvaj tradicioj de indiana tribo, serio de miskomprenoj kaj koincidoj... kaj multaj aliaj elementoj de krimromaneto, samtempe kun diversaj aspektoj de la Universala

Kongreso. La agadoj de la Kongreseto por Infanoj, kaj fojfoje ankaŭ kelkaj agadoj de la Kongreso por plenkreskuloj, intermiksiĝas kun la fadeno de la romana agado.

Ĉar ĉiuj infanaj kaj plenkreskaj herooj de la libro partoprenas la kongreson, aŭ almenaŭ havas iun rilaton kun ĝi, la legantoj malkovras multajn interesajn aspektojn de la Movado, precipe la amikeman internacian etoson, kiu regas dum Universalaj Kongresoj. Jen signifa fragmento koncerne tion:

“Eriko rimarkis, ke aliaj personoj rigardas ilin kun scivolemo. – Kompreneble, – komentis Roza –, ne ĉiutage oni vidas ĉininon, aŭstralianon, brazilanon, zairanon kaj svedon kune, kaj, plie, parolantajn la saman lingvon.”

La herooj de la romaneto havas malsimilajn personecojn kaj venas el malsimilaj tradicioj, sed sukcesas konsistigi efikan teamon, kiu solvas la komplikajn misterojn. Mi lasas al la legantoj la plezuron malkovri memstare kiel kaj kial la aventuroj finiĝas tre gaje, kiel en fabeloj. Ĉi tie mi citos nur la kortuŝajn vortojn, kiujn Andreo (la brazila knabo) adresas al la indiana junulo Mitaro, post kiam la aventuroj finiĝas: “– Mitaro, ĉiuj ni partoprenas en via ĝojo. Roza, Hua, Mavomo, Eriko kaj mi reprezentas ĉi tie la kvin kontinentojn. Kune kun vi ni reprezentas ankaŭ ĉiujn rasojn. Kaj ni ĉirkaŭprenas kaj komprenas unu la aliajn, kiel egaluloj. Tio estas afero tre grava. Neniam ni forgesos ĉi tiun nokton.”

Mi entuziasme rekomendas tiun belan libron por legado kaj ankaŭ por tradukado al kiel eble plej multaj naciaj lingvoj.

**“La malbena de Tarumo kaj Nurana” de José Mauro Progiante, kun ilustraĵoj de Mariana Hortolani Rodrigues, São Paulo, Associação Paulista de Esperanto 2018 (73 paĝoj).**

**J**en unu el la tre malmultaj porinfanaj aventur-romanetoj kaj samtempe unu el la malmultaj primovadaj libroj. Sed ĝia valoro ne ŝuldiĝas nur al la malofteco de ambaŭ supremenciitaj kategorioj. Ĝi ŝajnas al mi ege arteca verko, laŭ la bonega tradicio de Claude Piron, kiu verkis samĝenrajn verkojn por gejunuloj.

La libro adresiĝas al antaŭ-adoleska aĝo (ĉ. 10-13-jaraĝuloj). Sed la cel-publiko certe ne estas nur la infanoj, kiuj scipovas Esperanton. La aŭtoro aperigis ankaŭ portugalan version de tiu libro, kaj certe ajna nacilingva traduko estus ege bona agado por disvastigo de Esperanto. Koncerne la belege eldonitan Esperantan version, mi opinias, ke ĝi interesus ne nur infanojn, kapablajn legi ĝin flue kaj kompreni ĝin, sed ankaŭ tiujn (signife pli multajn), kies gepatroj kapablas legi ĝin kaj re-rakonti ĝin buŝe en siaj naciaj lingvoj. Tiu ĉi rimarko validas fakte por la tuta porinfana literaturo en Esperanto, sed aparte validas por tia beletraĵo, kiu plen-plenas je interesaj kaj utilaj informoj pri la Movado. Kvankam informojn pri la Movado la infanoj povas ricevi de siaj esperantistaj gepatroj aŭ konatuloj laŭ multaj manieroj, mi supozas, ke ilin aparte allogus tiom agrabla emociiga

# Legu kaj ĝuu



Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,  
ul. Kilińskiego 14/3,  
PL-59-300 Lubin,  
Pollando, rete:  
*malgosia.*  
*junaamiko@gmail.com*



## La libro plifortikigas

Malfacile estas forgesi feliĉon, kiun ni sentas legante librojn. Ĉirkaŭprenas nin fascina sento, ordigas niajn pensojn, ni pli bone nin komprenas kaj kompreneble ni lernas.

**U**nu el avantaĝoj de la legado estas tio, ke ĝi disvastigas simpatian. Ni bezonas tiun senton, ĉar dank' al ĝi ni lernas, kion aliaj personoj travivas same kiel ni. La simpatio atestas altan emocian inteligentecon kaj laŭ sciencistoj haltigas agreson. Ni legu valorajn librojn, ĉar ili estas fundamento de nia civilizacio.

## Klubo de bona libro

**L**a Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas danke al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli

fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn, kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo bonvolu sendi al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.

Legu, legu, legu!



## Rekomendo

**P**or la Biblioteko de *Juna Amiko* mi rekomendas la fabelaron “Tikiriki Tok el Strobilo”, kiun skribis Luiza Carol kaj bonkvalite eldonis ĝin en 2017 Dokumenta Esperanto Centro en Durdevac.

Luiza Carol el Israelo estas longdaŭra kunlaborantino de *Juna Amiko*. Ŝi donacis kelkajn ekzemplerojn de tiu rekomendata libro kiel premiojn dum la ĉi-jara 7-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Mi proponis al ŝi intervjuon, por ke ŝi mem rekomendu la libron al niaj legantoj.





# Intervjuo

**Luiza, vi publikigis tiun ĉi libron por infanoj, kiuj povas legi en Esperanto aŭ almenaŭ kompreni tion, kion oni voĉlegas al ili en Esperanto. Tiu rekomendita fabelaro estas ankaŭ por plenkreskuloj, ĉu ne?**

Jes. Ĝi povas interesi ankaŭ plenkreskulojn, kiuj ŝatas fantaziajn rakontojn.

**Ĉu vi rakontis fabelojn al viaj infanoj? Ĉu kreitajn de vi mem?**

Jes, mi rakontis fabelojn ĉu kreitajn de mi mem, ĉu de aliaj aŭtoroj.

**Kaj nun, ĉu vi legas fabelojn al viaj genepoj?**

Mi havas adoleskajn genepojn, kiuj ne plu bezonas helpon por legi. Ili daŭre ŝatas fabelojn kaj fantaziajn animaciaĵojn, samkiel mi.

**Ĉu tiu rekomendita libro “Tikiriki Tok el Strobilo” estas via unua publikigita libro?**

En junio 2019 pleniĝis 50 jaroj ekde kiam mi publikigas beletraĵojn en diversaj lingvoj kaj en diversaj ĝenroj. Entute mi aperigis pli ol 20 librojn, el kiuj 3 estas en Esperanto: “Rakontoj por ĉiuj aĝoj” (eldonita en 2009 de la poeto João José Santos), “Tikiriki Tok el Strobilo” (eldonita en 2017 de la poeto Josip Pleadin) kaj “Kantoj por geamikoj” (publikigita en elektronika formato de la poeto Amir Naor, kun bildarangoj fare de Liette Lêla).

**Ĉu vi povas iomete rakonti la enhavon de tiu libro?**

“Tikiriki Tok el Strobilo” konsistas el 9 apartaj rakontoj, verkitaj inter 2009 kaj 2017. Iliaj enhavoj estas tre diversaj; fakte ĉiu el ili povintus esti aparta malgranda libro. Ĉiu rakonto prezentas po unu signifan vivosperton, kiu maturigas la protagoniston kaj helpas tiun venki timon, handikapon, maljustecon ktp. La protagonistoj estas ĉu infanoj, ĉu

parolantaj bestoj, ĉu fantaziaj estaĵoj. Kelkfoje estas prezentita longa periodo el la vivo de la protagonisto, do ni povas sekvi ties evoluon ekde la infaneco ĝis la matura aĝo. Unu el la protagonistoj estas knabino, ankoraŭ nenaskita en la unua parto de la rakonto. (Ŝi vojaĝas kune kun nubo super la tero, por informiĝi pri la planedo en kiu ŝi baldaŭ naskiĝos. Nur poste ni povas legi pri ŝia infanaĝo kaj pri tio, kion ŝi planas por la estonteco.) Unu sola protagonisto ne vere maturiĝas, ĉar tiu ne estas homo, sed anĝelino. Fakte, ŝi venas sur la teron, por maturigi la mondon, kaj do ŝi estas la sola, kiu ne strebas plibonigi sin mem, sed volas plibonigi la homan vivon. Ŝi fakte malsukcesas, sed oni povas esperi, ke ŝia vizito sur la tero ne estis tute vana...

Indas mencii, ke tiu libro enhavas ne nur rakontojn, sed ankaŭ emociigajn bildojn. La plejmulto el ili estas fotoj pri pentraĵoj fare de la grafikisto Luch Ofer, mia filino. La eldonisto Josip Pleadin laboris kun entuziasmo kaj sentemo por la bela aspekto de la libro. Danke al li, okaze de la UK en Lisbono en 2018, la kroata eldonejo “Dokumenta Esperanto-Centro” en Durdevac ricevis la premion “Infanlibro de la jaro” por la publikigo de “Tikiriki Tok el Strobilo”.

**Kial vi decidis skribi tiun libron?**

Verŝajne ĉiuj homoj estas fabelistoj en siaj mensoj. Ĉu ekzistas homoj, kiuj ne imagas kien ili ŝatus vojaĝi, kiujn ili ŝatus ekkoni, kiel ili volas ŝanĝi siajn vivojn kaj sin mem, eĉ la tutan planedon, se eblus...? Mi skribis la rakontojn kunigitajn en tiun libron pro la sama kialo, pro kiu mi decidis skribi ĉiujn miajn aliajn beletraĵojn: mia animo bezonis ĝuste ilin. En mia menso mi kreas ĉiutage rakontojn, kiuj kelkfoje aliformiĝas en poemojn aŭ kantojn. Ili helpas min alfronti malfacilaĵojn, kuraĝigas min, helpas min maturiĝi kaj korekti miajn difektojn, ĝojigas min. Nur etan parton el ili mi skribas, kiam mi havas tempon kaj emon. El tiuj ĉi, mi selektas

kelkajn por publikigo, ĉar mi ŝatas kundividi ilin kun la legantoj. Ankaŭ la publikigo estas interesa sperto, kiu helpas min evolui kaj maturiĝi. Aŭ almenaŭ mi ŝatas kredi tion...

**Dankon! Ni do jam scias kiamaniere naskiĝis (ekkestis) la libro, kiun kelkaj personoj ricevis kiel premion dum la 7-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiu ĉiujare okazas en granda pola urbo, Vroclavo. Ĉu estante infano vi aŭskultis fabelojn – kaj kiu ilin al vi rakontis?**

Oni legis al mi fabelojn en la familio kaj oni igis min aŭskulti porinfanajn radioelsendojn. Kelkfoje mi spektis pusppektaklojn kaj animaciaĵojn, kiuj baziĝis sur fabeloj.

**Kiun fabelon vi pleje ŝatis?**

Mia preferata fabelo estis “Fingreto” de H. C. Andersen. Dum miaj ludoj mi kelkfoje imagis, ke mi mem estas Fingreto, kiu renkontas helikojn, lacertetojn, raŭpojn, papiliojn... Mi observis tiujn bestetojn, kvazaŭ ili havus pli-malpli mian altecon, kaj alparolis ilin amikeme... Mi ankaŭ alparolis kokinojn, kvazaŭ ili estus gigantaj bestoj kompare kun mi... Kelkfoje mi imagis, ke mi loĝas en eta domo, kiun mi konstruis el kartono...

**Bonvolu mallonge prezenti vin al niaj legantoj.**

Mi havis nek fratojn nek fratinojn, kaj do mi estis ofte ludanta sola. La protagonistoj de la konataj fabeloj fariĝis miaj amikoj, kun kiuj mi interparolis mense kaj ludis. Sed ofte mia ludo konsistis ĝuste en tio, ke mi mem ŝajnis esti la protagonisto de iu fabelo. Mia preferata ludo estis elpensi miajn proprajn fabelojn, kies protagonisto estis mi mem. Sed kiu estis mi mem? Kutime mi ŝajnis esti nevidebla bonkora feino, fluganta tra la mondo... Kiel plenkreskulo, iusence, mi daŭrigas tiun ludon, verkante beletraĵojn... Mia filino Luch Ofer estas grafikisto. Ŝi ilustris la plejparton el miaj libroj. Kiam ŝi estis infano, ŝiaj preferataj ludoj estis desegni kaj pentri bildojn pri la rakontoj, kiujn oni voĉlegis por ŝi. Kiam ŝi

finis la gimnazon, Luch pentris serion de grandaj belegaj pentraĵoj (oleo sur tuko), kiuj ilustris kelkajn el miaj poemoj. Dudek jarojn poste mi komencis verki fabelojn, kiujn tiuj pentraĵoj inspiris al mi. En la libro “Tikiriki Tok el Strobilo” troviĝas i.a. fotoj pri sep el tiuj pentraĵoj apud la koncernaj rakontoj. Estas mirinde, kiel miaj malnovaj poemoj aliformiĝis en la pentraĵojn de mia filino, kaj poste tiuj aliformiĝis en miajn nunajn rakontojn...

Por mia unua libro en Esperanto, “Rakontoj por ĉiuj aĝoj”, Luch kreis la kovrilon kaj 26 ilustraĵojn pri la Esperantaj proverboj, kiuj aperas kiel motoj de la koncernaj rakontoj. Antaŭ dek jaroj Luch kreis por mi retejon, kie oni povas legi pli da informoj pri miaj verkoj: <http://luiza.luch.co.il/biografie-2-2/>

**En nia revuo „Juna Amiko” mi instigas al legado kaj do mi estas scivola kiu(j)n libro(j)n vi la plej ŝatas?**

Mi limigos min al originala Esperanta literaturo, por apogi la disvastigon de tiu nesufiĉe konata kultura trezoro.

Por infanoj: Poemaro: “Ni vagu kunel!” de Bertram Potts. Rakontaro: “Steĉjo-fabeloj” de Julia Sigmond. Romanetoj: “La aventuroj de Ŝpar kaj aliaj porketoj” de Rik de Roover, “Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo” kaj “Padma, la eta dancistino” de Tibor Sekelj, “Klaŭda kaj la rivera sekreto” de Aitor Arana, “Mamutido Miĉjo” de Mikaelo Bronŝtejn, “La malbeno de Tarumo kaj Nurana” de José Mauro Progiante.

Por plenkreskuloj: Gvidlibro pri Esperanta kulturo: “Vojaĝo en Esperantlando” de Boris Kolker. Epopeo: “Poemo de Utnoa” de Abel Montagut. Dialogo: “Dio, psiĉo kaj mi” de Claude Piron.

Poemaroj: “Kontralte” de Marjorie Boulton, “La fontoj nevideblaj” de Baldur Ragnarsson.

Teatraĵoj: “Ĉe l’ akvo de l’ forgeso” de Marjorie Boulton, “Ni vivos” de Julian Modest.

Novelaroj: “La naŭa kanalo” de István Nemere, “Mistera lumo” de Julian Modest,



“Vage tra la dimensioj” de Konisi Gaku.

Historiaj romanoj: “La ŝtona urbo” kaj “Morto de artisto” de Anna Löwenstein, “Hodler en Mostar” de Spomenka Štimec, “Neniu ajn papilio” de Trevor Steele.

Psikologia romano: “Ombro sur Interna Pejzaĝo” de Spomenka Štimec.

Sciencfikcia humuraĵo: “Libazar kaj Tero” de Julia Sigmond kaj Sen Rodin.

Aventur-romanoj: “Mariagnes” de Lorjak, “Ĉu ni kunvenis vane?” de Claude Piron, “Varmas en Romo” de Corrado Tavanti.

**Se tio eblas, kiun verkist(in)on vi volus renkonti kaj interparoli kun li (ŝi)?**

Mi volus renkonti la verkist(in)on Lidja Zamenhof. En mia menso mi parolis kun ŝi plurajn fojojn. Mi verkis pri ŝia vivo teatraĵon kaj imagan leteron.

**Luiza, nun mi dezirus interparoli iomete pri Esperanto. Kial vi komencis lerni Esperanton? Ĉu ĝi ŝanĝis vian vivon?**

Mi eklernis Esperanton en aprilo 2005, kiam mi estis 58-jaraĝa. Mi scivolis ne nur pri la strukturo de la lingvo, sed precipe pri la originala literaturo en Esperanto. Mi lernis pri la Esperanta kulturo pere de la Perfektiga Koresponda Kurso de Boris Kolker. Jes, Esperanto multe plibeligas mian vivon. Danke al ĝi mi havas multajn geamikojn en diversaj landoj. Mi ofte uzas la lingvon por legi kaj verki beletraĵojn, aŭskulti kantojn ktp.

**Ankaŭ mia vivo ŝanĝiĝis dank’ al Esperanto kaj tial mi ĉiam estas scivola, ĉu ĝi ankaŭ influas vivon de aliaj personoj. Kio, laŭ via opinio, devus esti la plej grava atuto de la internacia lingvo?**

Laŭ mi, tre gravaj atutoj estas simpla regula gramatiko kaj bela kultura tradicio pri internacia amikeco.

**Kia estas via vivmoto (maksimo)?**

Mi strebas evolui kaj maturiĝi. Mi ne kredas, ke “maturiĝo” devus finiĝi ĉirkaŭ la aĝo de 20 jaroj kaj ke estus hontinde daŭrigi ĝin poste. Fakte mi deziras plibonigi miajn animon kaj menson ĝis la fino de mia vivo, se eblas...

**Kiuj estas viaj fortaj kaj malfortaj flankoj?**

Mi opinias, ke mia plej forta flanko estas tio, ke mi klopodas plibonigi miajn kapablojn kaj ankaŭ mian karakteron. Mia plej malforta flanko: mi ne ĉiam sukcesas plenumi tiujn celojn, pro malpersistemo, maldiligenteco, malkuraĝo k.a.

**Kiamaniere vi pasigas liberan tempon? Kiu estas via hobbio?**

Mi estas pensiulino nun, kaj do mia tuta tempo estas “libera”. Mi ŝatas eksperimenti novajn receptojn pri vegetaranaj manĝaĵoj, pianludi, naĝi, plenumi jogajn ekzercojn kaj meditadojn...

**Kio vi deziris fariĝi, estinte malgranda knabino?**

Mi deziris fariĝi bonkora feino.

**Finante, bonvolu respondi la lastan demandon: Kio estas por vi amikeco?**


Fidi iun kaj inspiri fidon al li aŭ ŝi. Ankaŭ kundividi pensojn kaj sentojn kun iu. Ankaŭ la ebleco helpi unu la alian aŭ bone kunlabori. Ekzemple, mi konsideras vin kiel amik(in)on, kara Maĝosia.

Ankaŭ mi konsideras vin kiel amik(in)on kaj fieras pri tio. Koran dankon pro viaj sinceraj respondoj. Mi ankaŭ dankas al vi, ke vi permesis enmeti en mian intervjuon vian portreton, kiun faris via filino Luch Ofer.





# Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo



Konkurso ne nur por junaj legantoj

Ĉi-numere mi proponas viziti la Ĉinan Popolan Respublikon (ĉine 中华人民共和国) aŭ simple Ĉinion. Ĝi estas lando de Liu Jianguo, kiu helpis al mi prepari la rubrikon. Liu Jianguo estas esperantisto, Esperanto-instruisto, estro de Hefei-Instituto de Turismo, estro

de Ĉina Instituto de Esperanto. Prenu mapon, trovu Ĉinion kaj per kelkaj informoj trovitaj en interreto konatiĝu kun ĝi. Poste tralegu la rubrikon kaj klopodu trovi sur la mapo la menciitajn lokojn kaj fine faru la konkursajn taskojn.

## Kio allogas min en Ĉinion?

Ĉinio (Ĉina Popola Respubliko) estas lando en orienta Azio kun la plej multthoma nacio en la mondo. Ĝi posedas vastan teritorion, abundon da naturaj riĉaĵoj kaj longan, eminentan kulturen historion. La plej konataj kaj gravaj

artefaktoj de ĉina kulturo estas kaligrafio, pentraĵo, teksaĵaj artoj, tradicia kuirarto, popoldancoj kaj batalartoj. Komencan datperiodon de la arto oni datas ĉ. 10 mil jarojn a.K. kaj ĝi ĉefe konsistis tiam el simpla ceramiko kaj skulptaĵoj. Sekve ĉina arto respegulis regantajn dinastiojn. Batalartoj, kiel kungfuo (ĉine: 功夫) aŭ ŭu ŝu (ĉine: 武術) prezentas nombron de batalstiloj, kiuj disvolviĝis dum jarcentoj, inspirataj de ĉinaj filozofio kaj legendoj.

La ĉina skriblingvo estas unu el la plej antikvaj en la mondo. Ĝi konsistas el hieroglifoj, kiujn oni gravuris sur testudaj karapacoj kaj bestaj ostoj. Ili fariĝis fonto de la nuna ĉina skriblingvo. Dum multaj jaroj la ĉinaj ideogramoj ŝanĝiĝis tiel, ke ĉiu ideogramo havas diversajn skribostilojn. En la tradicia ĉina kaligrafio gravas ne nur skribi ĉiun ideogramon bele, sed ankaŭ harmonie. Ĉinaj infanoj lernas kaligrafion en elementa lernejo. Se iu deziras lerni la ĉinan kaligrafion, tiu devas prepari specialajn penikon, paperon, tuĉon kaj tuĉfrotan ŝtonplaton, kiuj estas necesaj por la ĉina kaligrafio.

Ĉinio havas unu el la plej riĉaj kulinariaj heredaĵoj de la mondo. La manĝaĵo estas manĝata per manĝbastonetoj, kaj la likva





per vasta, platfunda kulero, kutime el ceramiko. Plej ofte la manĝaĵoj konsistas el malgrandaj pecoj, pretaj por tuja preno kaj manĝado. Por ĉinoj uzado de la tranĉilo estas barebareco. Ĉu vi scias, ke dum formala ĉina bankedo oni tute ne rajtas surtabligi hundajon?

Dum la transiro de la malnova ŝton-epoko al la nova, en ĉina oriento naskiĝis la gento gvidita de FuXi, la totemo de tiu gento estas Drako, kaj tiu gento kunmiksiĝadis kun alilokaj gentoj kaj iom post iom formiĝis Ĉina Nacio. Observante kaj esplorante la funkciojn kaj ŝanĝojn inter la tero, ĉielo, naturo, suno kaj luno, dum la periodo de FuXi oni inventis kalendaron konforman al ĉina geografio, klimato, vivmaniero kaj maniero de produktado kaj precipe plantado de rizo. FuXi kreis la plej fruajn ideologiajn sistemojn, kiu egalgrave enhavas la filozofiojn de la naturo kaj de la homo.

Dum la daŭro de ĉ. dek mil jaroj, en Ĉinio, la ŝtata regpotenco ĉiam estas altgrande unueciga je politiko, ekonomio kaj kulturo. En la longtempa historio, ekskluzivante la malhumanajn rimedojn de milita forto kaj hegemonio, Ĉinio praktikas la interŝanĝon kaj kununuigon kun la ĉirkaŭaj regionoj pere de civilizacio, kulturo, ekonomio, tekniko k.a.; el tio formiĝas la unueciga ĉina nacio.

De antikveco Ĉinio estas la lando kun granda loĝantaro. Por pli efike administri ŝtaton, socion, familion kaj individuon, la ŝtato ellaboris detalajn regulojn kaj normojn, kiujn ŝtato, familio kaj individuo observas ekz. inter ŝtatestro kaj korteganoj, inter gepatroj kaj gefiloj, inter geedzoj, inter gefratoj, inter kolegoj, inter najbaroj k.a. Tio ne estas aŭtokratio, sed leĝo. De antikveco ĝis nun ĉinoj obeas tiun feran leĝon pri la sociordo: fari nenion sen reguloj kaj normoj. Ĉinoj enmetas tian leĝon pli multe en la kategorion de moralo ol en la kategorion de juro. Tial ne miskomprenu, ke Ĉinio estas aŭtokratia ŝtato, kaj tie ne ekzistas demokratio kaj

homaj rajtoj. En Ĉinio antaŭ kvin mil jaroj jam aperis la principo de demokratia interkonsiliĝo, kaj antaŭ pli ol du mil secent jaroj aperis la respublika reĝimo.

En la konstitucio de Ĉinio, Popola Respubliko estas klare difinita, ke la socialisma reĝimo estas la fundamenta reĝimo de Ĉinio, kaj ke la fundamenta ekonomia sistemo estas, ke la publika posedsistemo, kiel la ĉefa parto komune disvolviĝas kun diversaj proprietoj. La Komunista Partio de Ĉinio gvidis la popolamason, renversis la kapitalisman sistemon kaj praktikas la socialisman sistemon konforman al la intereso de plej vasta popolamaso. La nuna ĉina socio estas malferma al la mondo, kaj disvolviĝas kune kun la internacia socio.

Por viziti Ĉinion vi bezonas multege da tempo. Tamen havante malmulte da tempo valoras viziti Ŝanhajon, la ekonomian centron de Ĉinio; Hangzhou, la ĉefurbon de Zhejiang-provinco, kie en 2016 okazis G-20 Pinto; Suzhou, la Orientan Venecion kun silkfabriko; Nankinon, la ĉefurbon de la iama Respubliko de Ĉinio; Hefei, unu el kvar bazlokoj pri scienco kaj edukado en Ĉinio, la ĉefurbon de Anhui provinco; Zaozhuang, la urbon de Shandong provinco; Tianjin, la ĉemaran urbon; Pekinon, la ĉefurbon de Ĉina Popola Respubliko kun Malpermesita Urbo kaj Granda Muro. Ĉinio estas la tria plej granda lando en la mondo, post Rusio kaj





Kanado. Nuntempe Ĉinio fariĝis unu el la ĉefrolantoj en monda komerco.

La ĉina Esperanto-movado estas forta. Universala Kongreso de Esperanto mem okazis dufoje en Ĉinio, en 1986 (kun 2482 partoprenantoj) kaj en 2004 (kun 2031 partoprenantoj), ambaŭfoje en la ĉefurbo Pekino.

Se vi deziras viziti Ĉinion, interkonsentiu tion kun Liu Jianguo, kiu perfekte preparos vian viziton. Mi atestas tion, ĉar mi partoprenis ekskurson, kiun li preparis kaj venontjare probable mi kun grupo revenos Ĉinion, kompreneble dank' al kunlaboro kun Liu Jianguo ([kunlaboro@aliyun.com](mailto:kunlaboro@aliyun.com)).

## Legendoj

Liu Jianguo proponas tralegi du legendojn konatajn al ĉiu ĉino. Unu estas pri la amo de Teksistino kaj Bovisto, verkita antaŭ pli ol 1700 jaroj kaj la dua legendo rakontas pri homo, kiu decidis ebenigi montojn kaj ĝi estis verkita antaŭ pli ol 2500 jaroj.

## Legendo pri amo inter fraŭlo kaj fraŭlino

En la ĉielo loĝis Teksistino kaj Bovisto. Ili ekamis unu la alian, sed ili ne povis paroli pri sia amo. La Ĉiela Leĝo malpermesas, ke fraŭlo kaj fraŭlino ŝtele enamiĝis. Teksistino estis filino de la Sinjorino de Ĉiela Imperio, kiu ne volis ke ŝia filino pasigu sian vivon kun Bovisto, kaj eksciante

pri la amo de la junuloj ŝi elpelis lin en la homan mondon, ordonante al Teksistino senĉese teksti nubodesegnaĵajn brokaĵojn kiel ŝian punon. Post kiam Bovisto estis faligita sur la teron, Teksistino ĉiutage ploris kaj kuntiris brovojn, sopirante al sia Bovisto. Ŝi sidis ĉe la teksilo kaj senĉese teksadis la belajn nubodesegnaĵajn brokaĵojn, por vekti kompaton de la Sinjorino de Ĉiela Imperio, kalkulante, ke ŝi permesu al Bovisto pli frue reveni en la ĉielon.

Iutage kelkaj feinoj petis la Sinjorinon de Ĉiela Imperio, ke ili povu naĝi en la Blu-lotus-lago, kiu estis en la homa mondo. La Sinjorino tiun tagon estis en bona humoro kaj donis permeson. Vidante, ke Teksistino ĉiutage estas malĝoja, ŝi ankaŭ permesis al ŝi naĝi kun feinoj, sed rapide reveni. La Sinjorino de Ĉiela Imperio tre amis sian punitan filinon.

En la tero Bovisto reenkarniĝis (renaskiĝis) en la familio de kamparano. Post la morto de la gepatroj li vivis sola, okupigante pri maljuna kaj neparolema taŭro. Li do silente pasigis tagojn ne suspektante, ke tiu maljuna taŭro efektive estis reenkarniĝo el la Taŭra stelo sur la ĉielo.

Tiun tagon kiam la feinoj deziris naĝi, la maljuna taŭro subite alparolis al Bovisto:

“Hodiaŭ iru al la Blu-lotuso-lago. Tie vi vidos kelkajn naĝantajn feinojn. Kaŝu la ruĝan veston de unu el ili. Ŝi estos via edzino.” Bovisto, aŭdante parolantan taŭron, terurigiĝis, sed poste tre ĝojis kaj demandis: “Mia frato, maljuna taŭro, ĉu vi vere povas paroli? Ĉu viaj vortoj estas veraj?” La maljuna taŭro kapjesis. Bovisto iris do al la lago kaj forprenis la ruĝan veston. Vidinte Boviston, la feinoj haste surmetis siajn vestojn kaj forflugis kiel birdoj, sed nur la unusola feino ne povis forflugi sen vesto. Tio estis Teksistino. Ŝi tre terurigiĝis kaj ne sciis kion fari. Tiam Bovisto proponis redoni la veston al ŝi, se ŝi edziniĝos al li. Teksistino profunde rigardis liajn okulojn kaj tuj rekonis sian



Boviston, al kiu ŝi forte sopiris. Tiamaniere Teksistino kaj Bovisto komencis kunan vivon. Li kulturis la teron kaj ŝi teksis. Ili profunde amis unu la alian kaj pensis, ke ilia vivo estos ĉiam feliĉa, des pli, ke ili jam havis du infanojn. Tamen, la feliĉaj momentoj devis baldaŭ finiĝi. La Sinjorino de Ĉiela Imperio sendis specialan ĉielan trupon por kapti Teksistinon kaj alkonduki ŝin al la ĉiela domo, por puni ŝin. Tiun tagon Teksistino kuiris tagmanĝon, kiam subite Bovisto revenis ege malĝoja hejmen. Li diris al la edzino, ke la maljuna taŭro mortis. Antaŭ la morto la taŭro postulis, ke Bovisto senfeligu ĝin kaj konservu la felon, ĉar iun tagon dank' al tiu felo li povos suprenflugi en la ĉielon. Aŭdinte tion, Teksistino nur nun ekkomprenis, ke la maljuna taŭro estis la Ĉiela Taŭro, sed ŝi ne komprenis, kial la taŭro tiel abrupte mortis. Tuj post la entombigo de la taŭro subite la ventego muĝis kaj la ĉiela trupo forkaptis Teksistinon al la ĉielo. Flugante Teksistino aŭdis la voĉon de Bovisto: “Kara, atendu min” – kaj ŝi ekvidis Boviston en taŭra felo kun iliaj infanoj, kiu postkuras ŝin. La infanoj etendis siajn brakojn kaj laŭte kriis: “Panjo, panjo”. La distanco malkreskis. Tamen ĉi-momente, la Sinjorino de Ĉiela Imperio alvenis, piedpremante la



bonaŭguran nubon. Ŝi eligis el la haroj la oran harplinglon kaj strekis unu linion inter la geedzoj. Tiumomente, unu ĉiela rivero aperis, ondis kaj torentis inter ili, kaj ili, perdante esperon, decidis plorante ĵeti sin en tiun ĉielan riveron.

Tiu situacio, montranta grandan amon, vekis kompaton de feinoj kaj eĉ kortuŝis la Sinjorinon de Ĉiela Imperio, kiu permesis al Bovisto kun siaj infanoj resti en la ĉielo. Tamen la familio estis apartigita per la ĉiela rivero. Ili povis renkontiĝi ĉiun sepan tagon de la sepa monato (laŭ la ĉina kalendaro) kaj do unu fojon jare. En la aŭtuna nokto, inter la diversaj steloj de la ambaŭflanko de la Lakta Vojo, sur la ĉielo ni povas vidi du grandajn stelojn brilantajn. Ili estas Vego, formiĝinta el Teksistino kaj Altairo, formiĝinta el Bovisto, kaj ĉe Altairo estas ankoraŭ du malgrandaj steloj, kiuj estas la infanoj de Teksistino kaj Bovisto. Ĉiun sepan tagon de la sepa monato sennombraj pigoj alflugas, amasiĝas kaj formas la ponton de pigoj, Teksistino kaj Bovisto kun siaj infanoj renkontiĝas sur la ponto de pigoj. Komento: Ekde tiu tago, kiam Teksistino kaj Bovisto renkontiĝas la sepan tagon de la sepa monato ĉiujare, formiĝis la ĉina Valentino en ĉina kulturo, kaj ankaŭ alinome tio estas la Festo de geamantoj (same kiel Sankta Valentino en kelkaj mondopartoj).





## Legendo pri spirito kun obstina persisteco

Du montoj, Taihang kaj Wangwu, kies areoj vastas ĉirkaŭ septcent kvadratajn kilometrojn kaj la alteco estas inter 1500 kaj 2000 metroj, staras sude de la provinco Jizhou kaj norde de la Flava Rivero. Norde de tiuj montoj loĝis Malsaĝa Avo, kiu aĝis jam preskaŭ 90 jarojn. Lia domo staris ĉe la montoj kaj li sentis grandan ĝenon pro tio, ke la montoj baris al li la vojon, kaj li devigite ĉirkaŭiris ilin. Li do kunvokis siajn familianojn por interkonsiliĝo.

“Ni kune ebenigu la montojn kaj faru rektan vojon al la bordo de la rivero Hanshui. Ĉu bone?”

Ĉiuj aprobis lian ideon unuanime, sed lia edzino dubis pri la afero kaj diris:

“Via forto ne sufiĉas eĉ por iom malaltigi monteton, kaj tiuj montoj estas grandegaj. Kion vi povus fari kontraŭ ili? Cetere, kien vi metos la multegon da tero kaj ŝtonoj?”

“La ŝtonojn kaj teron ni jetos en la maron”, respondis Malsaĝa Avo kaj la sekvan tagon li jam iris kun siaj filoj kaj nepoj labori. Ili fosis ŝtonojn kaj teron, kaj ĵetis ĉion en la maron. Ankaŭ la fileto de najbara vidvino alvenis por helpi ilin.

Iu Saĝa Maljunulo, kiu loĝas ĉe la riverkurbo, mokis ilian penadon kaj provis ilin ĉesigi, dirante al Malsaĝa Avo:

“Vi estas malsaĝa! Vi sensukcese pene laboras, kaj vi devigas aliajn labori. Tio

estas vana laboro. Vi ne ebenigos la montojn.”

Je tio Malsaĝa Avo suspiris kaj respondis:

“Vi estas nekuraceble stulta! Vi eĉ ne estimas laboron de la infano de la vivino. Mi mortos baldaŭ, sed miaj filoj postvivos min kaj ili havos siajn infanojn, kiuj havos siajn filojn, kaj tiel plu. Tiamaniere generacio sekvas generacion senfine kaj la montoj ja ne kreskos. Kial do ni ne ebenigos ilin, solide laborante?”

Neon respondis Saĝa Maljunulo. Tamen tiun interparoladon aŭdis iu dio kun serpento en la manoj kaj timegis, ke la homoj senĉese laborados. Li do sciigis pri tio al Granda Dio, kiun kortuŝis estimo al la laboro kaj ordonis, ke du forteguloj transportu tiujn du montojn, unu el ili al la oriento de la regiono Cuodong kaj la alian al la sudo de la regiono Cuoyong.

Depost tio, sude de la provinco Jizhou kaj norde de la Flava Rivero, ne troviĝas altaĵo kaj malebenaĵo.

Komento: Tiu legendo estis verkita antaŭ pli ol 2500 jaroj kaj gvidas al la difinita celo, decido, memfido, penado, persistado, por fine atingi la venkon.


## La konkursa tasko

Redaktu 10 demandojn pri la tuta teksto de *Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo*.

Se vi ŝatas desegni aŭ pentri, sendu al ni bildo(j)n, kiu(j) bildforme prezentos la legendon. La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko “Konkurso – legendo” ĝis la 31-a de oktobro 2019 al la adreso:

Europejskie Centrum Edukacji  
Międzykulturowej, ul. Kołłątaja 26A,  
PL- 50-007 Wrocław, Polska (Pollando).

La valorajn premiojn fondis  
Eŭropa Centro de Interkultura Edukado  
(pole: Europejskie Centrum Edukacji  
Międzykulturowej).



Rubrikestro:  
Elena Nadikova,  
Esperanto-klubo "Betuleto"  
Lernejo/Ŝkola 56,  
pr. Traktorostroitelej, 38  
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio  
*lena\_espero@mail.ru*



## La 52-a ILEI- kongreso en Serbio

### Saluton, karaj legantoj!

Denove finiĝis la somero. Kaj tial venis tempo por rakonti pri la ĉefa somera evento por nia Ligo. Certe, temos pri la 52-a ILEI- kongreso. Ĝi okazis en Serbio, en la urbo Ĉaĉak.

**S**erbio apartenas al balkanaj landoj. Ĝi situas en la sud-oriento de Eŭropo. Serbio havas pli ol 8 milionojn da loĝantoj. Ĝia teritorio egalas al preskaŭ 89 miloj da kvadrataj kilometroj. La flagon kaj la blazonon de Serbio vi povas vidi sur la foto apude.

Ĉaĉak situas en la meza parto de Serbio, iom sude. Estas tre pitoreska montara regiono de la lando. La plej famaj montoj Ovĉar kaj Kablar ĉirkaŭas la urbon. En Ĉaĉak loĝas pli ol 72 miloj da homoj. Estas en ĝi la rivero Morava kaj multaj parkoj.



Gastigis la kongreson la Fakultato de teknikaj sciencoj de Ĉaĉak. Ĝi apartenas al la Universitato de la urbo Kragujevac. Danke al tiu la kongresanoj havis bonajn kondiĉojn por laboro en la universitata kampo. La kongreso havis la temon "Lernado en virtualaj komunumoj". Ĝi estas moderna kaj tre aktuala temo, unuavice por ILEI mem. La modernaj teknologioj tre rapide evoluas. Pli kaj pli da homaro ĉiutage uzas ilin. Kunlabore kun la Fakultato ILEI organizis kadre de





sia kongreso dutagan scienca konferenco kun la temo: "Edukado en virtualaj komunumoj". La partoprenantoj aŭskultis diversajn prelegojn pri la kongresa temo. Prezintis siajn konojn kaj spertojn multaj altnivelaj pritemaj fakuloj. Do, ni esperas, ke ĉiuj kongresanoj malkovris por si mem ion utilan kaj novan.

Ne nur profesoroj, sed ankaŭ studentoj de la fakultato prezentis siajn spertojn pri uzado de modernaj teknologioj. Por ili estis bona okazo partopreni en la internacia scienca konferenco, interalie danke al Esperanto. Espereble, en la estonteco ili atingos altan nivelon en evoluigo kaj disvastigo de modernaj teknologioj, inkluzive edukadon. Ni deziru sukceson al ili! Ankaŭ por instruistoj-prelegintoj estis bona ŝanco ricevi aldonajn poentojn en sia profesia kariero dum la konferenco.

La solenan malfermon de la konferenco partoprenis lokaj moŝtuloj: la vicurbestro de Ĉaĉak kaj la dekanino de la fakultato de teknikaj sciencoj. Ili afable salutis la

kongresanojn, deziris sukcesojn al la konferenco kaj al la Esperanto-movado. La kongreson sekvis lokaj televido, kiuj raportis pri ĝi kaj intervjuis la organizantojn kaj partoprenantojn. Danke al tiu vasta disvastigo de la informoj la ILEI-kongreso iĝis grava evento por Ĉaĉak kaj la universitato. Naskiĝis novaj kontaktoj. Venis novaj ideoj. Estis atingita interkonsento inter ILEI kaj la fakultato pri plua kunlaboro en kadre de la universitata agado. Tio estas tre grava rezulto por nia Ligo. Unuafoje dum ĝia historio estis organizita dum la kongreso tiom altnivela kaj bonkvalita internacia scienca konferenco. Do, la lingvo Esperanto iĝas pli kaj pli utila por apliko en universitata medio. Ni gratulu ĝin kaj esperu al prospero de tiu agado!

La alia eksterkonferenca programo estis kutime abunda. Okazis kursoj pri Esperanto laŭ du niveloj: por komencantoj kaj progresantoj. La partoprenintoj ĝuis tradiciajn programojn: frandvesperon, nacian vesperon, lingvan festivalon kaj







aliajn. La kongresanoj plezure malfermis por si serban kulturon. Dum la nacia vespero ilin amuzis loka virina kantgrupo “Ĉaĉanska lira” (Liro de Ĉaĉak) kaj infana folkloro grupo “Bambi”. Ili kantis serbajn popolajn kantojn kaj dancis gajajn naciajn dancojn. Mirinda vespero!

La jaro 2019 estas neordinara jaro por ILEI. Ĝi iĝis 70-jaraĝa! Jen impona jubileo, ĉu? Omaĝe al tiu evento okazis grandioza ludvespero. La Prezidantino de ILEI preparis abundajn kvizojn, dediĉitajn al la jubileo. La demandoj estis ampleksaj, interesaj, ofte malfacilaj, kvazaŭ ekzamenoj. Tamen la kongresanoj multe kontrolis siajn sciojn kaj bone amuziĝis.

Abundis turisma parto de la kongreso. Serbio ne estas tiom konata lando vidpunkte de la turismo. Kaj tute vane!

Ĝi havas multajn naturajn kaj historiajn vidindaĵojn. La kongresanoj multe ĝuis la belegajn pejzaĝojn de Ovĉar-Ĵablara interkrutejo, de la kanjono de la rivero Drina. Kaj eĉ sukcesis viziti la najbaran landon Bosnio-Hercegovino. Okazis ankaŭ alloga antaŭkongreso tra Serbio, la partoprenintoj vizitis Beogradon. Post la kongreso kelkaj partoprenintoj spektis belegajn panoramojn de la rivero Uvac kaj de la nacia natura parko Tara.

Do, belajn impresojn lasis Serbio en la animoj de la partoprenintoj. Kiel ĉiam, la kongreso havis gravajn atingojn kaj neeviteblajn mankojn. Tamen la ĉefa celo – uzi Esperanton kaj disvastigi ĝin – estis perfekte realigita ĉi-kongrese. Ni danku la organizantojn kaj strebu al novaj sukcesoj pri, por kaj pere de Esperanto!



Renée Triolle

# Virinoj inventis

**Jen plia artikolo pri virinoj-inventintoj. Kelkaj, ne aparte fakulinoj pri iu scienco, inventis ĉiutagajn objektojn.**

## Sarah Guppy

(1770-1852) proponis jam en 1841 planti arbojn, ĉefe poplojn, ĉe la bordoj de novaj fervojoj, por stabiligi la grundon. Ŝi same proponis iuspecan boligilon por teo, kafo kaj ovo. Ŝi inventis la praulon de kamenkapuĉo por “suĉi” la odorojn en kuirejo; ŝi trovis praktikan kandelington por pli longe bruligi kandelojn. Ĉefe konata kiel inventinto de ŝnurpontoj (1811): la unua agnoskita estis Isambard Kingdom Brunel's Clifton.



## Mary Anderson

(1866-1953) estis agrikulturistino. Dum frosta vintro ŝi konstatis, ke ŝoforo devas lasi fenestron malfermita por mane balai neĝon kaj glacieron for de la ventosirmilo. Ŝi pripensis kaj konstruis internan levilon, kiu funkciigis eksteran kaŭĉukan klingon. Tiel naskiĝas vitroviŝilo, kiu unue ekipis Cadillac-aŭtojn kaj poste ĉiujn veturilojn de la mondo.



## Virginia Apgar

(1909-1974) estis kuracistino-anestezistino. Ŝi konceptis serion de kontroloj (nomatan “skoro Apgar”) por facile kontroli, tuj ĉe la naskiĝo kaj 5 minutojn



poste, per simpla observado, sen komplika aparataro, ĉu la naskiĝinta bebo estas normala kaj bone vivos. Temas pri la korbatado, spirado, haŭtkoloro, reago kaj tonuso. Ekzemple, ĵusnaskiĝinto devas kapabli levi la krurojn por supreniri ŝtupon!

## Anne Connely

Alia aĝo por savi vivojn estas eksteraj ŝtuparoj, proponitaj jam en 1897 de Anne Connely, ankoraŭ konstruitaj en urbaj domoj de Usono, dum savelirejoj estas devigaj en multaj landoj en ĉiuj lokoj, kiuj akceptas publikon (teatrejo, kinejo, biblioteko, lernejo, eĉ malsanulejo).

## Stéphanie Kwolek

(1923-2014) estis profesia kemiistino, kiu patentigis ĉu 17, ĉu 28 inventaĵojn, sed estas ĉefe konata pro malkovro de Kevlaro, poli-parafenileno tereftalamido (ufl), kiun ŝi malkovris en la fama firmao Du Pont de Nemours/Dupon' de Nemur'/ por anstataŭigi ŝtalaĵojn en pneŭmatikoj. Tiu nova kemiaĵo estas tiom fortika, ke ĝi ekipas policajn kontraŭkuglajn veŝtojn, sed ankaŭ uziĝas en kaskoj, sportaj ekipaĵoj, ŝipaj ŝeloj, sekurgantoj ktp. Ŝi estis honorigita per kelkaj premioj.



## Maria Telkes

(1900-1995) – oni nomis ŝin “Sun-Reĝino”. Ŝi naskiĝis en Hungario en 1900, iĝis doktorino pri fiziko kaj kemio, migris al Usono, kie ŝi fakiĝis pri stokado de sunenergio. Tre aktuala temo kaj bezono! Jam en 1947 ŝi konceptis la unuan termoelektran generatoron, en 1953 termoelektran frostigilon, inventis sensaligan “uzineton” por savboatoj ktp.






## Lady Ada Lovelace

Ĉu vi povas imagi vian vivon sen komputilo? Supozeble ne. Ĉu vi scias, ke la filino de la angla poeto Lord Byron, Lady Ada Lovelace (1815-1852) produktis per maŝino la unuan algoritmon? Ŝi edukis tri infanojn, sed en 1839 ŝi tute modeste “eklaboris”, tradukis kaj faris notojn pri la unua analitika maŝino de Charlie Babbage. Honore al ŝi “ADA” nomiĝis programlingvaĵo en la jaroj 1977-1983.



## Edy Lamaar

Mi finas per Edy Lamaar (1914-2000). Kvankam ŝi naskiĝis en Vieno (Aŭstrio), ŝi karieris en Usono – kiel aktorino! Simbolo de beleco (laŭdire Walt Disney kopiis ŝian vizaĝon por desegni la Neĝulinon), kun pianisto kaj komponisto George Antheil, ŝi konceptis, jam en 1941, sekurigon por telekomunikado. Unue uzita militcele por gvidi torpedojn (ekzemple dum la krizo inter Usono kaj Sovetunio en Kubo en 1963, aŭ dum la milito en Vietnamio), la sistemo ne estas malhavebla hodiaŭ, kiam vi uzas vifion aŭ GPS-on.



## Grace Hopper

(1906-1992) – doktorino pri matematiko, admiralo de usona mararmeo, laboris pri komputiloj en la universitato Harvardo, ĉe la firmao IBM ekde 1957; ŝi naskis la unuan kompilatoron en 1951 (A-O sistema) kaj lingvaĵon COBOL en 1959.



Kiel vi povis konstati, ne necesas esti fakulo por inventi tertreman inventaĵojn. Ofte el la ĉiutaga vivo venas bezono, kiun eblas plenumi post iom da observado kaj kun iom da imagoj.

Do, ne timu, ek!

# Infana kongreseto

Internacia Infana Kongreseto en Lahtio dum la 104-a UK allogis ne nur infanojn. Inter la 17 partoprenantoj troviĝis adoleskantoj, la aĝoj variis de 6 ĝis 18 jaroj. La grupanoj venis de Ĉeĥio, Ĉinio, Finnlando, Francio, Hongkongo, Katalunio, Luksemburgio, Rusio – kaj la gvidantoj el Belgio, Grekio, Ĉinio, Finnlando, Francio, Hongkongo kaj Rusio. La kongreseto okazis apud lago en la kamparo je la distanco de 15 km de la urbocentro. Tie la kongresetanoj povis baniĝi, naĝi, pagaji kaj ĝui la naturon. Je mia bedaŭro mi rimarkis, ke de la medio taŭga por la kongresa temo



“vivanta naturo” ili ne profitis. La parto-prenantoj ne konatiĝis kun la norda naturo kaj ties arboj kaj aliaj plantoj. Unuj uzis la interreton kaj sian telefonon laŭ siaj urbaj manieroj, ĉiuj kantis kaj muzikis, vizitis amuzejon Linnanmäki en la ekskurso-tago. Ili ankaŭ serĉadis trezorojn (iam kun binditaj okuloj), ludis, desegnis, fotadis, faris “pinjajetojn” por la adiaŭa vespero. Tio estas balonformaj koloraj ujoj, kiujn oni pendigas kaj rompas per baston-batoj tiel, ke elfalas bombonoj. En la Solena Fermo de la UK la kongresetanoj ĝojigis la aŭskultantojn, kantante “La Lingvo por ni”.

Tiu kanto havas plurajn versiojn de vortoj, kaj mi esperas, ke la malnovaj iom rasismaj strofoj estos forgesitaj kaj anstataŭigataj per strofoj pli modernaj kaj ĝentilaj rilate la sam-ideanojn en evolulandoj.

Saliko



Liba Gabalda

# BET-55 en Litovio – Panevėžys 6.-14.7. 2019

**Baltiaj Esperanto-Tagoj bonvenigis nin per pluv-sun-venta vetero. Ili estas internaciaj aranĝoj kun altnivelaj programeroj, kun simila enhavo kiel la Universalaj Kongresoj.**

**B**ET-oj okazadas laŭvice en Estonio–Latvio–Litovio. Ĉiutage aperis riĉe ilustrita kvarpaĝa kuriero *Abelo*, redaktita de Stano Marček. Per ĝi ni estis informitaj pri diversaj okazaĵoj, aperis listo de novaj aliĝintoj, taga programo kaj manĝmenuo. Li ankaŭ kompilis belan 158-paĝan BET-libron kun utilaj sciigoj kaj raportoj de ĉiuj jam okazintaj BET-aranĝoj en Litovio (8 numeroj de *Abelo* kaj *BET-libro* elŝuteblas ĉe: <https://kurzelinks.de/BET55>).



Aliĝis 450 esperantistoj el 37 landoj. Laŭ la nombro de partoprenintoj la ĉi-jara BET estas la plej impona lastatempe. La 6-an de julio Litovio festas Nacian Tagon. Estas kutimo kanti la himnon (nacian Glorkanton) je la 9-a horo vespere ie ajn en la mondo, kie troviĝas litovoj. Do, same okazis dum BET-55 post la vespera koncerto de Natalia Bertse.

La solena inaŭguro okazis la dimanĉan posttagmezon en la kultura centro de Panevėžys, dum la ĉeesto de la urbestro Rytis Račkauskas. La prezidanto de la litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas bonvenigis ĉiujn partoprenantojn. Biruta Rozenfelde estis iniciatinto de BET-oj antaŭ sesdek jaroj. Post la prezentado de diversaj salutvortoj, artaj folkloraj grupoj de la urbo prezentis belegan spektaklon de kantoj kaj dancoj. Poste okazis por ĉiuj riĉa urbestra akcepto. La programo de BET-55 estis varia kaj riĉega. Ne eblas menciigi ĉiujn programerojn, ĉar du paĝoj ne sufiĉus. Okazis sinsekvo da prelegoj de Somera Universitato, de SUS-36 (Sanmarineca Universitata Sesio) de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) pri kiu eblis aĉeti IKU-libron. Interesaj estis ankaŭ aliaj prelegserioj pri diversaj temoj.

La partoprenantoj povis ekkoni la historion de la litova lingvo kaj ĝian kulturaron fare de Aloyzas Gudavičius. Pri spacteleskopoj informis Amri Wandel, pri religio kaj sociologio de Esperanto Walter Ŝelazny. En prelegserio de Márkus Gábor “Ĉu Esperanto plibonigis/plibonigas la mondon?” ni provis trovi la respondon. Prelegserio de Orlando Raola temis pri “Media kemio”, medioprotektado en la hidrosfero, terkruisto, biosfero. La prelegciklon pri “Lingvo kaj kulturo” prezentis Ilona Koutny.

Pri la azia movado informis Lee Jungkee, pri historia E-movado en Ĉinio kaj instruado en ĉinaj universitatoj kaj lernejoj kaj pri la situacio de medio kaj energio en Ĉinio donis informojn Gong Xiaofeng (Arko). Amuze kaj serioze pri diversaj karakteroj de Esperanto parolis Aleksandr Melnikov. Baŭhaŭsan artan stilon prezentis Peter Kühnel. Pri “Zamenhofaj objektoj” (Zeoj) parolis Robert



Kamiński. Li ankaŭ iniciatis kaj instalis interesan ekspozicion de Zeoj. La mondon de fabeloj kaj diversaj herooj prezentis Anna Striganova. Pri la eldonejo *Esperanto*, pri la Reta Revuo *Esperanto*, pri modernaj sociaj retoj kaj Esperanto parolis Dima Ŝevčenko. “Ĉu muziko povas kuraci?” kaj kiamaniere tio okazas klarigis Pavla Dvořáková. Pri “Plastaĵoj en la diversaj akvosferoj” informis Manfred Westermayer. Pri gravitaj ondoj parolis Alfred Heiligenbrunner. Intelektajn ludojn prezentis Tatjana Auderskaja. Kanadanoj varbis por la venontjara UK en Montrealo.

Ĉeestantoj spektis la filmon “Litvo - Patrujo mia” de Roman Dobrzyński. Okazis kunveno de ĵurnalistoj kaj aŭtoraj horoj kun Mikaelo Bronŝtejn kaj Tatjana Auderskaja. Estis lanĉita nova eldono de “Baza literatura Krestomatio”. Riĉa estis la libroservo, okazis interesaj kvizoj, por Di-kredantoj okazis Meso. Admirinda estis la ekspozicio de pupoj de Anna Striganova. Kortuŝan prezentadon montris sepjaraĝaj infanoj de la urba infanĝardeno “Puriena”, laŭ la slovena popola fabelo “Paŝtisteto”.

La diversnivelajn Esperanto-kursojn gvidis la jenaj instruistoj: Stano Marček el Slovakio, Nina Petuchovska el Pollando, Abdurachman Junusov el Dagestano, Anne Jaussions kaj Françoise Noireau el Francio, Svetlana Smetanina el Rusio kaj Mikaelo Lineckij el Ukrainio.

La oferto de la esperantista arta programo estis varia kaj tre riĉa. Okazis ĉiutagaj posttagmezaj kaj vesperaj koncertoj. Kun granda sukceso kaj aplaŭdo koncertis por ni la konata litova familia grupo “Sepa kaj Asorti”, Kaŝi el Germanio, Amira Chun el Koreio, Jogaile Ĉojute el Litovio, Mikaelo Bronŝtejn el Rusio, akompanata de Sergej



Straŝnenko (LaTerura) ankaŭ el Rusio, Zuzana Kornicka el Pollando. Violonis Françoise Noireau el Francio. Belsonis ankaŭ kantoj el Ukrainio.

Dum la adiaŭa vespero prezentiĝis niaj talentuloj. Ni ĝuis Esperanto-kantojn el Ukrainio, Svislando, Ĉeĥio, Rusio, Pollando, korean dancon, poemon de la knabino Daŝa el Rusio. Ventro-dancadon prezentis litova junulino. Mika-

elo Lineckij reĝisoris la programon kaj prezentis la artistojn.

Neforgesebla estis la tuttaga ekskurso al la urbeto Birzai, kie ni en kastela muzeo gustumis bieron, ekkonis ĝian fabrikadon kaj ĝuis muzikan prezenton. Poste ni daŭrigis la busvojaĝon al la regiona parko, kie eblis supreniri rigardejon en formo de ŝipo kaj fine en urbeto Pakruojis ni bonguste tagmanĝis kaj promenis en bienpalaca ĝardeno, admirante belegajn florkomponaĵojn. La duontaga ekskurso gvidis nin al bieno de aromaj plantoj, kie ni mem pretigis infuzaĵon el ili kaj gustumis lokan mielon kun fromaĝo.


Solena fermo okazis la 13-an de julio. Estis prezentita statistiko pri BET-55, disdonitaj atestiloj al sukcesintaj ekzamenitoj, rozoj al ĉiuj LKK-anoj kaj helpintoj. Koran dankon al litovaj esperantistoj, kiuj multe laboris por sukcesigo de BET-55 kaj al multaj eksterlandaj gastoj, kiuj kontribuis al la arango.




Rektmetoda kurso por komencantoj, gvidita de Stano Marček

# Krucenigmo pri Kanado

La rubrikon  
prizorgas:  
Stefan MacGill



En 2020 la 105-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Kanado. Ankaŭ la Kongreso de la Instruistoj (ILEI) okazos en tiu giganta norda lando. Kanado estas la dua plej granda lando en la mondo, laŭ la surfaca areo. Pri la kongresaj urboj trovu la informojn en la retejoj de UEA kaj ILEI.



## Horizontale →

1. La urbo en kiu okazos la 53-a Kongreso de ILEI en julio 2020. (7)
7. La faro, kiu ebligas al vi ne faligi objektojn. "En Kanado estas multaj monegoj. Dum grimpadado tre gravas la \_\_\_\_ de ekvilibro." (4)
8. Esprimo de bedaŭro kaj ĝeno, ekzemple, se vi stumbas dum montogrimpado. (2)
10. La urbo de la 105a Universala Kongreso de Esperanto, organizita de UEA: la Universala Esperanto-Asocio. (8 R)
11. Justin Trudeau estas la nuna Ĉef-Ministro de Kanado. \_\_\_\_ estas la 23a Ĉef-Ministro. (2)
12. Okazis pli frue nur unu Universala Kongreso, en 1972 en la urbo \_\_\_\_\_. (8 R)
15. "Kondutu kun \_\_\_\_!". Kun respekto al la kutimoj pri ĝentileco. (4)
16. La fino de ŝak-partio. (4)
17. Estas kred\_\_\_\_, ke la vikingoj atingis Kanadon kaj ekloĝis tie en la 11a jarcento.
19. Ŝafoj produktas \_\_\_\_on, valora por jakoj, kiuj donas protekton dum la severaj kanadaj

- vintroj. Ŝafoj unue venis al Kanado en 1664.
20. \_\_\_\_\_ estas la plej loĝata urbo en Kanado kaj la ĉefurbo de la provinco Ontario.
22. Parto, frakcio. Pli ol du\_\_\_\_ de la popolo de Kanado loĝas en la Ontaria kaj Kebekia provincoj.
23. La kongresa oferto estas tre \_\_\_\_\_.  
Mi deziras partopreni! Alloga, konvinka. (5)

## Vertikale ↓

2. Malgrando. Yellowknife estas urb\_\_\_\_ en okcidenta Kanado.
3. Lando en okcidenta Afriko, kies ĉefurbo estas Porto-Novo, kun la registaro en Kotonuo.
4. Kun V moviĝo de aero. Kun D maĉilo, kun P bedaŭro, kun C unu pli ol naŭdek naŭ.
5. Loko, kie okazas juraj procezoj. La supera \_\_\_\_o de Kanado troviĝas en la ĉefurbo Otavo. (6R).
6. Kun formo simila al malgranda ovo.
9. Preparanta por forlasi la domon. (8)
10. Malgrandan translokiĝon (7).
13. La arbo, kies folio formas la simbolon de Kanado. El la suko de tiu arbo oni produktas mondfaman siropo. (5)
14. Inter du montoj oni ofte trovas \_\_\_\_\_. (5)
15. Fiksita tempo-punkto. La \_\_\_\_ por la komenco de la Kongreso de ILEI estas la 25a de julio 2020. (4)
18. La Universala Kongreso okazis en Finnlando en la kur\_\_\_\_a jaro. (3)
21. 'Kafo kaj \_\_\_\_': populara kanto de muzika grupo Amplifiki, el la albumo 'Tute ne gravas' el 1986.





## Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

**Aŭstralio:** Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; [info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au). **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; [aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at). **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2000 Antwerpen; [financoj@fel.esperanto.be](mailto:financoj@fel.esperanto.be). **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; [belabutiko@esperanto.org.br](mailto:belabutiko@esperanto.org.br). **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; [eab@esperanto.org.uk](mailto:eab@esperanto.org.uk). **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; [mrvp@interpres.org](mailto:mrvp@interpres.org); [ilei@espereto.com](mailto:ilei@espereto.com). **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; [polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz); [cea.polnický@quick.cz](mailto:cea.polnický@quick.cz). **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; [strigo@esperanto.cl](mailto:strigo@esperanto.cl). **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; [arko.gong@qq.com](mailto:arko.gong@qq.com). **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; [arnecasper@yahoo.com](mailto:arnecasper@yahoo.com). **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; [ahto.siimson@esperanto.ee](mailto:ahto.siimson@esperanto.ee). **Finlando:** Paula Niinikorpi, Rustrhollintie 6 as 10, FI-28430 Pori; [paula.niinikorpi@gmail.com](mailto:paula.niinikorpi@gmail.com). **Francio:** Unuigo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; [esperanto-france@esperanto.org.net](mailto:esperanto-france@esperanto.org.net). **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; [wolfgang.schwanzer@esperanto.de](mailto:wolfgang.schwanzer@esperanto.de). **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; [zsofia.korody@esperanto.de](mailto:zsofia.korody@esperanto.de). **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid. **Hispanio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell. **Hungario:** HEA, Thököly út 58-60, II/209, HU-1146 Budapest; [hungario@gmail.com](mailto:hungario@gmail.com), [www.esperantohea.hu](http://www.esperantohea.hu). HEA vendas surloke unuopajn numerojn por la kuranta jaro po 500 ft., duono de la kutima abonprezo. Plia peranto: Boris Arrate Veranes, Emma u. 3a, HU-2030 Érd, Hungary; [simio\\_2004@yahoo.es](mailto:simio_2004@yahoo.es). **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; [esperanto@isl.is](mailto:esperanto@isl.is). **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; [saviogp@netvision.net.il](mailto:saviogp@netvision.net.il); [esperantisto@live.com](mailto:esperantisto@live.com). **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; [silkovojo@aliceposta.it](mailto:silkovojo@aliceposta.it). **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; [esperanto@jei.or.jp](mailto:esperanto@jei.or.jp). **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; [marija@hes-keu.hr](mailto:marija@hes-keu.hr). **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; [irenaa@takas.lt](mailto:irenaa@takas.lt). **Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefarefaret 8 A, NO-4340 Bryne; [akbondhus@jkn.no](mailto:akbondhus@jkn.no). **Nov-Zelando:** David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland 0753; [gddewar@ihug.co.nz](mailto:gddewar@ihug.co.nz). **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzeczka 74/4, PL-31-559 KRAKÓW; [mtatara@gmail.com](mailto:mtatara@gmail.com). **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; [asocio@esperanto.pt](mailto:asocio@esperanto.pt). **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul București 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; [sezonoj@mail.ru](mailto:sezonoj@mail.ru). **Serbio:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, RS-18000 Niš; [zciric2@gmail.com](mailto:zciric2@gmail.com). **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; [petro@ikso.net](mailto:petro@ikso.net). **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B Igh 1303, SE-931 38 Skellefteå; [leif.holmlund@telia.com](mailto:leif.holmlund@telia.com). **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; [ch\\_scheidegger@bluwin.ch](mailto:ch_scheidegger@bluwin.ch). **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; [rezamenhof@yahoo.com](mailto:rezamenhof@yahoo.com). **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; [esp.togo@cafe.tg](mailto:esp.togo@cafe.tg). **Usono:** Esperanto-USA, 1500 Park Av #134, Emeryville CA 94608; [eusa@esperanto-usa.org](mailto:eusa@esperanto-usa.org). **TUTA MONDO:** Abonservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; [uea@uea.org](mailto:uea@uea.org). **Mendojn eblas sendi ankaŭ al [ilei.officejo@gmail.com](mailto:ilei.officejo@gmail.com).**



Fotoj pri BET-55 en Litovio (legu sur la paĝoj 36-37)

Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda